

Prezo: 7 €


www.satesperanto.org

Januaro-Februaro 2017 | n-ro 01-02 (1339-1940)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Apostolo de la Ideo

Al Liberto Maíz, kiu naskiĝis en januaro 2016

Vi vojaĝis per trajnoj astmaj kaj agoniaj,
jen – malmultfoje – ene,
jen ele – surtegmente – de vagono.
Vi vojaĝis surdorse de azenoj magraj kaj elĉerpitaj,
Kaj vi vojaĝis, ĉefe, paŝ-post-paŝe,
trivante la sandalojn sur vojoj polvoplenaj
pro sunoj kaj forgesoj.
Vi portis dorsosake la tutan humanecon de Bakunin.
Kaj vi rakontis ĝin ĉe kamenfajro,
aŭ en la lumo de luno farmodoma,
al taglaboristaro konsumita
de malsat' kaj maljusto.
Via voĉ' levis ĉiujn al la rango de homoj.
De ravitoj de l' ega lumo de la Ideo.

Vi semadis futuron kaj kolektis la plej valoran frukton:
l' utopion en korpo kaj animo.
Sed oni prenis for de vi ĉi frukton
kaj oni ĝin tretaĉis
kaj oni vin mortigis aŭ ekzilis.
Poste elradikigis
eĉ la plej etan eĥon viavoĉan.

Vi kvardek jarojn poste renaskiĝis
tiel impete, ke oni ne permesis
al vi semadi plue vian semon.
Oni vin remortigis.

Sed vi plue renaskiĝas ilin spite.
Tion antaŭ nelonge vi lastafoje faris
sur ĉefplacoj de urboj kaj vilaĝoj.
Ho, kiom da pasi', kia certeco,
ke la futuro sidas man-atinge!
Kelkaj el la viuloj vin ne vidis.
ne sciis vidi vin, ĉar ili kredas,
ke vi aperos nepre kun barbo Kropotkin'a,
sed vin ornamis tamen feltharoj Bob-Marley'aj.



MIGUEL FERNÁNDEZ

BILDO FAR SERĜO SIR'

Karaj legantoj,

Jen numero denove enhavanta plurajn kontribuojn, kiuj fontas el materialo prezentita okaze de la pasinta SAT-kongreso. Ĉu vi jam pripensis vian ĉeeston, kaj eventuale eĉ partoprenon en la programo de la venonta, kiu estos la unua SAT-kongreso en Azio?

Al tiuj diverstemaj kongresaĵoj aldoniĝas aparte varia kolekto de artikoloj, spegulanta la diversecon de vidpunktoj kaj manieroj aktivi ene de SAT. Certe ne kun ĉio vi plene konsentos, sed ĉu ni ĉiuj ne estas kune por reciproke kleriĝi kaj kunkreski per interŝanĝo de malsamaj spertoj kaj opinioj?

Fine, ni invitas vin atente legi la ĉi-suban komunikon de la PK, kaj pripensi vian eventualan kandidatiĝon. Ĉies helpo estas bonvena, kaj utila. La plenumo de administraj taskoj estas necesa por certigi efikan eldon-agadon kaj glatan kongres-organizado.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 5-6 (1343-1344) : 20a de aprilo

Sennaciulo 7-8 (1345-1346) : 20a de junio

Eleko de nova Plenum-Komitato de SAT

La Plenum-Komitato de SAT sciigas la membraron, ke ĝia mandato finiĝos la 28an de februaro 2018. Ĝi invitas ĉiujn individuojn kaj grupojn elekti siajn kandidatojn aŭ kandidati persone por la nova PK. Ĉiu kandidato bone legu la paragrafon 13 de la statuto. Por kandidatiĝi bonvolu procedi jene:

1a. Individuaj kandidatoj bonvolu sendi skriban kandidatiĝon, kun mallonga sinprezento kaj malgranda foto, al la SAT-sidejo aŭ rekte al la adreso konto@satesperanto.org antaŭ la 15a de majo 2017.

1b. SAT-rondo povas sendi liston de kandidatoj, kun samaj indikoj kiel supre.

2. Ĉiuj kandidatoj estos prezentitaj al la membraro unue en la juli-aŭgusta Sennaciulo, poste dum la kongreso en Seulo, kaj fine decidos la ĝenerala referendumo, kiu ekos en novembro 2017.

3. Dum la referendumo, oni voĉdonos por ĉiu kandidato individue, kaj la 8 kandidatoj kun plej granda nombro de jesaj voĉoj estos novaj PK-anoj.

Frontpaĝa bildo

Sovetuniaj koncentroj por japanoj (p. 23)

Enhavo

Enhavo

TRA LA MONDO

- 4 Jes al la tutmondiĝo ... de la solidareco ANDREAS LANGHOLF
- 6 Usonajn manojn for de Sirio RENATO CORSETTI
- 7 Fidel Castro Ruz VILHELMO LUTERMANO
- 8 Pri la 1-a de majo en Francio PETRO LEVI

SINDIKATISMO TUTMONDA

- 9 Jemeno: DNO devas pagi siajn salajrulojn
- 9 Brazilo: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la sindikato en la Universitato de San Paŭlo
- 9 Nikaragvo: Ĉesigu la kriminaligon de la sindikata protestado, forlasu la akuzojn

EKOLOGIO KAJ MEDIPROTEKTADO

- 10 Klimatŝanĝo kaj kapitalismo GUY MARTIN
- 12 Ĉu ni povas permesi, ke TEPCO kaj la registaro forĵetu nin kaj Fukuŝima-n? HORI JASUO

BELETRO

- 2 Apostolo de la Ideo MIGUEL FERNÁNDEZ
- 15 Pri la poemo Apostolo de la Ideo MIGUEL FERNÁNDEZ
- 16 Monaj ĉifonoj (1) ESPOPORE

MUZIKO

- 18 Fama hispana rok-ensemblo priomaĝas Esperanton MIGUEL FERNÁNDEZ
- 20 Ĉu Eŭropa festo ne plu ravas? MARCELO REDULEZ

KOKINO

- 21 Vivi kaj lasi vivi FLORA MARKOV
- 22 La historia memorigado en la kinejo RICARDO BIURRUN

LABORISTA HISTORIO

- 23 600 mil japanoj estis retenitaj en Siberio HORI JASUO

INTELEKTA MEMDEFENDO

- 25 Estas urĝa tempo reeki al atako! XAVIER MORIN

SAT-ANOJ AKTIVAS

- 28 Impresegoj el la SAT-kongreso DIETER ROOKE
- 29 Omaĝo al Marcos Ana FÉLIX LOBO
- 31 Esperanta afiŝo kontraŭ rasismo MIYAZAWA NAOTO

NEKROLOGO

- 15 Frans Jahger LEE MILLER

EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 30 Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Donacoj

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com

Jes al la tutmondiĝo de la solidareco

La kontribuo de Justa Komerco kiel ponto inter homoj tra la tuta mondo

Kial gravas Justa Komerco? Kial SAT “subtenas plivastigon de vera ‘justa komerco’, kiam ekologia kaj ‘justa’ produktado ne eblas surloke” en ĝia gvidrezolucio? [1]

Ĉi tiu artikolo baziĝas sur prezentado fare de la aŭtoro ĉe la SAT-kongreso 2016 en Herzberg am Harz kaj la diskuto inter la delegitoj pri la demando: Kio estas ĉi tio – vera justa komerco?

Ekzistas diferencaj formoj de Justa Komerco. Kompreneble la pli malbona formo de Justa Komerco estas kiam gemastroj nur diras ke ili traktas la laboristojn kaj la kamparanojn juste, sed ne vere faras. Ĉi tiu formo ne estas afero de ĉi tiu artikolo, sed montras la bezonon de sistemo de kontrolo kia estas la sistemo de Fairtrade International [2].

Tamen mi ankaŭ volas diri ke ĉi tiu sistemo nur estas minimuma nivelo kiu ne celas ŝanĝi la kapitalisman sistemon mem. Kontraŭe, ĝi provas plibonigi ĝin por ŝanĝi ĝin al sistemo pli humaneca. La merkato povas de produktantoj estas altigita jam en la



internacia sistemo Fairtrade.

La idealaj eble estus liberaj retoj de liberaj laboristoj sen regado de mastroj, organizataj en kolektivoj de kampuloj kaj laboristoj. Kelkaj movadoj jam ekzistas, kaj iliaj produktaĵoj estas haveblaj en la mondbutikoj. Tamen, hodiaŭ, por granda merkato, sistemo kiel Fairtrade estas bona ideo por garantii minimumnivelon de vera Justa Komerco, ĉu ne?

Ne ĉiam estas facile trakti aliajn homojn en nia ĉirkaŭo afable, bone aŭ almenaŭ juste, ĉu ne? Aŭ ĉi tio estas simpla afero por vi? Ĉu kun aliaj kuncivitanoj de via socia klaso? Legu ĉi tiun artikolon kaj malkovru kelkajn bazajn principojn de Justa Komerco kaj ĝian bazan siglon Fairtrade, kiu garantias tiujn bazajn principojn.

Minimumprezoj

Ĉi tiuj estas bone difinitaj kaj sendepende fiksataj de la asocio Fairtrade International, kiu estas reto de asocioj de produktistoj kaj konsumantoj. La prezoj estas taksitaj tiamaniere, ke la kultivistoj kaj kamparanoj povas kovri siajn produktad- kaj viv-kostojn. Ĉi tiu prezo estas fiksita en

aŭ super la prezo en la mondmerkato: La prezo de la produkto mem estas la prezo en la mondmerkato aŭ la minimumprezo en Fairtrade, depende de tio, kiu estas pli alta.

Rigardu en la apuda bildo la draste fluktuantajn prezojn en la mondmerkato por unu tuno da kafo. La minimumprezo en la sistemo de Justa Komerco estas konstanta, kiam pli alta ol la prezo en la mondmerkato. Do, la kultivistoj povas scii, kalkuli kaj fidi enspezojn fiksitajn kaj garantiitajn en la sistemo de Justa Komerco.

Premio


Krome, la produktistoj kaj laborantoj povas ĝui la premion – notu ke ĉi tiu premio ne estas pagita al unuopaj individuoj mem, sed al la komunumo de la kultivistoj. La alteco de la premio estas difinita kaj sendepende fiksita de la Bazaj Normoj Fairtrade, ekzemple:

– Baza premio de Justa Komerco: 18 € aŭ 20 \$/ tuno.

– Alta premio de Justa Komerco por ekologia terkultivado: 27 € aŭ 30 \$/ tuno.

Ĉi tio ebligas la efektivigon de projektoj komunaj, ekz. la konstruo de





Kafo-mondmerkato: komparo inter Fairtrade- kaj New York-prezoj

infan-vartejoj, vojoj, lernejoj ktp., la turnon al la ekologia terkultivado aŭ (plu)klerigon surloke.

Kondiĉoj de produktado kaj komerco

Ankaŭ decidoj pri la sekvanta disvolvado de la sistemo de la organizaĵo, pri la determino de la normoj kaj de la nivelo de la minimumprezoj estas prenitaj kune, egalrajte, de la reprezentantoj, la produktistoj kaj la naciaj asocioj.

Fairtrade donas al la produktantoj la alirojn al mondmerkato kaj pli bonan scion pri kiel funkcias ĉi tiu merkato. La celo estas establi komercon plej rektan kun malmultaj aŭ neniu interkomercisto. Ĉiuj komercpartneroj strebas kaj deklaras longedaŭrajn komercajn interrilatojn.

Laboristoj sur plantejoj ne nur ricevas la garantiitan minimum-salajron, sed tiuj estroj klarigas paŝojn al salajroj vere sekurigantaj la ekzistadon de vivo digna. Ili laboras sub laborkondiĉoj de ILO [3], kontrolantaj ekz. maksimumajn labortempojn, laborprotektion, neekspluatadon de infanoj, neekzistadon de diskriminacio pro sekso aŭ etno, kaj ĉeesto de garantio de kunven-libereco (liberaj sindikatoj!).

Subteno al la daŭripova evoluo

Ĉiu produktaĵo estu atentema pri niaj resursoj kaj medifavora per la normoj de daŭripoveco en la Bazaj Normoj de Justa Komerco, sed ne ĉio etiketita estas kontrolata ekologie. Se ekologia terkultivado estus kriterio de aliro, multaj produktantoj estus ekskludataj, ĉar kaj la konvertiĝo de la sistemo de terkultivado, kaj la atestado estas kostaj, kaj ili bezonas scion. Tamen Fairtrade multe subtenas la konvertiĝon (ekz. proponojn pri pliklerigo aŭ premio-pago). Hodiaŭ pli ol duono de la produktaĵoj devenas el kontrolata ekologia terkultivado.

Do, por resumi: JES, eblas trakti aliajn homojn tra la tuta mondo juste – aŭ almenaŭ pli juste – homojn, kun kiuj vi certe neniam konatiĝos persone.

Kion vi pensas? Ĉu ni bezonas la tutmondigon de solidareco en nia malgranda planedo, en nia familio de homaranoj?

ANDREAS LANGHOLF (M. SC. INĜENIERO PRI AGRONOMIO, GERMANUJO)

Notoj

[1] <http://www.satesperanto.org/Gvidrezolucio-kaj-Deklaracio-2016.html>

[2] Fairtrade International estas asocio. La anoj estas kaj la retoj de produktistoj de Sudameriko, Afriko kaj Azio, kaj la naciaj retoj (ekz. TransFair en Germanujo, Max Havelaar en Francujo kaj Nederlando ktp.).

[3] ILO: International Labour Organization (Internacia Labor-Organizaĵo)



Usonajn manojn for de Sirio

Urĝa mesaĝo por paco antaŭ la limo de pli vasta milito

Ni levas nian voĉon kontraŭ la perforto de milito kaj la enorma premo de milita propagando, mensogoj kaj kaŝitaj celoj, kiuj estas uzataj por pravigi ĉi tiun militon kaj ĉiujn pasintajn usonajn militojn.

Ni, la subskribintaj organizaĵoj kaj individuoj, subtenas la sekvajn Unuecajn Punktojn, kaj ni laboros kune kiel laŭcela koalicio por helpi fini la intervenon por reĝim-ŝanĝo fare de Usono, NATO kaj iliaj regionaj aliancanoj kaj la mortigon de senkulpaj homoj en Sirio:

1. La daŭrigo de milito en Sirio estas la rezulto de interveno aranĝita de Usono kaj farata de Usono, NATO, ilia regionaj aliancanoj kaj reakciaj fortoj. La celo de tiu interveno estas ŝanĝo de la reĝimo en Sirio.

2. Ĉi tiu politiko de ŝanĝo de la reĝimo estas eksterleĝa kaj en klara rompo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la teksto kaj la spirito de la internacia juro kaj de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj.

3. Ĉi tiu politiko de perforta ŝanĝo de la reĝimo minacas la sekurecon de la regiono kaj de la mondo kaj ĝi pliigis la danĝeron de rekta konfrontiĝo inter Usono kaj Rusujo, kun la potenciala sekvo de nuklea katastrofo en la tuta mondo.

4. Milito kaj la sankcioj de Usono kaj Eŭropa Unio malstabiligis ĉiun sektoron de la siria ekonomio, kaj ili transformis iam mem-sufiĉan landon al lando dependa de helpo. Duono de la siria loĝantaro estas nun dislokita. Raporto de UN ESCWA malkaŝas, ke ĉi tiuj usonaj sankcioj al Sirio detruas helpolaboron dum unu el la plej grandaj homaj krizoj ekde la dua

Mondmilito. Triono de la siriaj rifuĝintoj en la najbaraj Jordanio, Libano kaj Turkujo estis multe frapitaj de la usonaj buĝetaj tranĉoj al UNICEF. Ĉi tio devigas senesperajn rifuĝintojn klopodi atingi Eŭropon.

5. Neniu fremda instanco kaj fremda registaro aŭ armita grupo havas la rajton perforti la fundamentajn rajtojn de la siria popolo al sendependeco, nacia suvereneco kaj memregado. Tio inkluzivas la rajton de la siria registaro peti kaj akcepti armean subtenon de aliaj landoj, kiel eĉ la usona registaro diris.

6. Nur la popolo de Sirio havas la netransdoneblan rajton elekti siajn proprajn gvidantojn kaj difini la karakteron de la propra registaro, libere de fremdaj intervenoj. Ĉi tiu rajto ne povas bone esti plenumata en la kondiĉoj de la fremda interveno aranĝita de Usono kontraŭ la siria popolo.

7. Nia kontraŭstaro estas kontraŭ la reĝimŝanĝo en Sirio fare de fremdaj potencoj kaj de iliaj dungosoldatoj subtenataj de Usono. Ne estas nia afero subteni aŭ kontraŭi la prezidanton Asad aŭ la sirian registaron. Nur la siria popolo havas la rajton decidi pri la legitimeco de sia registaro.

8. La plej urĝa temo nuntempe estas paco kaj fino de la perforto de fremdaj intervenoj, kiun sekvis la morto de centoj da miloj da homoj kaj la dislokado de milionoj da sirianoj kaj interne kaj kiel rifuĝintoj eksterlande.

Baziĝinte sur tiuj Unuecaj Punktoj, ni, kiel individuoj kaj organizaĵoj – en laŭcela koalicio – konsentas pri la ĉi-sekvaj celoj kaj devigas nin labori kune

por helpi atingi ilin:

1. Tuja fino de la usona politiko de perforta reĝim-ŝanĝo en Sirio kaj plena agnosko de kaj obeo al la principoj de internacia juro kaj al la Ĉarto de UN, inkluzive de la respekto pri la sendependeco kaj teritoria integreco de la teritorio de Sirio fare de Usono, NATO kaj iliaj aliancanoj.

2. Tuja fino de ĉia fremda agreso kontraŭ Sirio, kaj serioza klopodo al politika solvo de la milito.

3. Tuja fino al ĉia milita, financa, transporta kaj spiona subteno fare de Usono, NATO kaj iliaj regionaj aliancanoj al ĉiuj fremdaj dungosoldatoj kaj ekstremuloj en la regiono de Meza Oriento.

4. Tuja fino de ekonomiaj sankcioj kontraŭ Sirio. Amasa internacia helpo por dislokitaj homoj en Sirio kaj por siriaj rifuĝintoj eksterlande.

Nur en paca kaj sendependa Sirio, libera de fremda agreso, la popolo de Sirio povos libere plenumi siajn suverenajn rajtojn, esprimi sian liberan volon kaj fari liberajn elektojn pri sia registaro kaj pri la gvidantoj de sia lando.

Ni invitas ĉiujn subtenantojn de paco kaj de la rajto de la popoloj al memdecidado en la tuta mondo kunigi sin por kunlabori en ĉi tiu klopodo atingi ĉi tiujn hom-amajn celojn.

Ni bezonas labor-postenojn, san-servojn, edukadon kaj finon de la rasisma perforto de la polico ĉi tie hejme, ne usonajn militojn eksterlande!!

Tradukis Renato Corsetti

Fonto: <https://www.liberationnews.org/u-s-hands-off-syria-coalition-points-of-unity-statement/>



Siriaj civitanoj antaŭ la landlimo de Turkujo



Flagoj de Usono kaj NATO

Fidel Castro Ruz

Fidel Castro Ruz nun mortis, 90-jara, je sia natura morto, malgraŭ la multegaj murdroprovoj, kiam li estis en respondeca funkcio, faritaj precipe de la usona sekreta servo. La kubanoj konsideras lin, apud sia José Martí, sia nacia heroo.

Kaj ne senkiale. La atako al la kazerno de Santiago de Kubo kontraŭ la usone subtenata Batista-reĝimo, en 1953, kiu malsukcesis kaj en kiu li kun aliaj estis kaptita, fariĝis ĝis hodiaŭ simbolo de la kuba rezistado al la usone trudita sistemo kaj de la insistado de la kubanoj pri sia rajto je memdecido kaj je socia justeco. Lia parolado antaŭ la tribunalo, “La historio absolvos min” – ankaŭ tradukita al Esperanto – fariĝis la teoria bazo de la kuba revolucio.

Poste, kun manpleno da homoj – inter ili lia frato Raúl, Ernesto Che Guevara kaj Camilo Cienfuegos – kaj kun la aktiva apogo de la grandega parto de la kuba popolo li en mallonga tempo, en sinsekvaj bataloj, liberigis Kubon el la usona novkoloniismo – io ĝis tiam ne vidita en la historio.

Sub lia gvido la kubanoj venkis la invadon de usonaj ekzilkubanoj, kiuj elŝipiĝis en la Porkogolfo apogate de Usono. Ekonomie kaj politike izolita fare de Usono, Kubo en la sekvo estis helpata de USSR kaj de la ceteraj landoj de la socialisma mondsistemo, kaj, kvankam ne industriigita kaj tute subevoluinta lando, sur tiu bazo povis konstrui la socialismon ... ĝis la kolapso de la eŭropaj socialismaj landoj komence de la 1990-aj jaroj.

La helpo de Kubo al aliaj revoluciaj movadoj en la mondo, precipe en Afriko, estis kelkfoje decida. La decido de Fidel milite helpi Angolon kontraŭ la trupoj de la sud-afrika apartheid-reĝimo (la decida venko en Cuito Cuanavale) ŝanĝis la sorton de la tuta suda Afriko.

Ekde la 1990-aj jaroj denove izolita kaj devigata iel-tiel elturniĝi en la epoko, kiun la kubanoj nomas la “speciala periodo”, Kubo sub Fidel iom post iom transiris al provoj konstrui

ekonomian bazon por povi konstrui la socialismon, do aplikis politikon, kiu pli aŭ malpli sekvis tiun de Lenino, kiam tiu troviĝis en simila situacio: en esence neindustriiginta lando kaj izolita en kapitalisma mondo, rompi la izolitecon per kompromisoj kun eksterlanda kapitalo por konstrui ekonomian bazon necesan por konstrui la socialismon. La modelo de Ĉinujo kaj de Vjetnamujo kaj la rilatoj kun ili kaj kun latinamerikaj landoj faciligis la paŝojn sur tiu vojo.

La komenca izoliteco de Kubo en Latinameriko, trudita de Usono, en la fluo de la tempo inversiĝis kaj kondukis al relativa politika izoliteco de Usono en Latinameriko.

La sukceso de la politiko kaj praktiko de Fidel Castro ne estas komprenebla sen liaj principoj, esprimitaj en la 10 punktoj de “Kio estas revolucio?” Surpriza por iuj, sed ne de marksistoj, estas ke la unua punkto de tiuj principoj estas: “Sento pri la historia momento”. Do, “sento”, kiu gvidas la homon, kompreneble laŭ lia analizo de la historia situacio. Tio helpas distingi tion, kio jam eblas, disde tio, kio ankoraŭ ne eblas.

La evoluo de Latinameriko, de multaj landoj en tiu mondoparto sur socie progresema vojo, estas pli aŭ malpli rekte ligita kun Fidel Castro.

Lia parolado en Rio-de-Ĵaneiro en 1992, (kiu komenciĝis per la vortoj “Grava biologia specio estas minacata malaperi pro la rapida kaj progresiva forigo de ĝiaj naturaj vivkondiĉoj: la homo. Nun ni ekscias pri tiu ĉi problemo, kiam estas preskaŭ tro malfrue por malebligi ĝin.” [1]) montras lin kiel unu el la unuaj ŝtatestroj, kiuj plene konsciis pri la graveco de la klimata ŝanĝo.



Fidel Castro

Kaj nelaste, multaj Esperantistoj ne forgesos, kiam Fidel, dum Universala Kongreso de Esperanto en Havano, deklaris sin “soldato de Esperanto”.

La principoj de Fidel, lia modelo kaj lia pensado restas vivaj en la kuba popolo same kiel en la revoluciaj movadoj de Latinameriko. En la konscio de la progresemaj homoj en la tuta mondo li restas kiel grandulo de analiza pensado kaj de konsekvenca praktiko. Lia influo ne ĉesas kun lia morto. Mi finu kun la kubanoj: “Hasta la victoria siempre, Fidel!” (“Ĝis la venko ĉiam, Fidel!”).

Havano, la 26-an de novembro 2016

VILHELMO LUTERMANO

Noto

[1] Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj. Parolado farita en Rio-de-Ĵaneiro dum la Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Medio kaj la Disvolvado, la 12-an de junio 1992, kaj parolado farita ĉe la solena fermo de la Monda Konferenco “Dialogo de Civilizacioj. Latinameriko en la 21-a jarcento: Universaleco kaj Original-eco”, Havano, la 30-an de marto 2005. Kun enkonduko de la aŭtoro. Tradukita de Amparado Cisnero Rovira. Kontrollegita de María Julia Cárdenas Cápiro. Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-9529537-7-1, paĝo 11-12.

Pri la 1-a de majo en Francio

Laŭ franca laborista tradicio kaj kulturo, la 1-a de majo estas bataltago de la tutmonda laboristaro. La faŝista regnestro Philippe Pétain, amiko de Hitler dum la nazia okupacio de Francio, por malarmi la francan laboristan klason, decidis fari el tiu tago “Feston de la Laboro”. De tiam la 1-a de majo por multaj francoj estas ne nur bataltago kontraŭ la kapitalista subpremo en Francio kaj en la mondo, sed ankaŭ bataltago kontraŭ la faŝismo aŭ ĝia renaskiĝo tie, kie ĝi estas venkita.

Laboristo estas tiu, kies akiro de vivrimedoj ĉefe aŭ nur dependas de la vendo de ties laborforto. Pro la financa koncentriĝo de la kapitalismo, kies komenco jam estis konstatita en la 19-a jarcento, la laborista klaso nun estas ĉirkaŭ 99 % de la franca socio. Tial iuj ne plu vidas ĝin, ne konsciante, ke ili mem estas en ĝi.

Senlaborulo estas laboristo senigita je siaj vivrimedoj. Studento estas estonta laboristo, kiu dependas de laborista solidareco. Pensiulo estas laboristo, kiu per sia laboro gajnis



laboristan solidarecon por siaj tagoj de maljuneco.

Individuaj entreprenuloj ofte nur estas laboristoj sen laboristaj rajtoj sed kun mastraj respondecoj. Alie ili ankaŭ estas kolektantoj de plusvaloro por pli potencaj kapitalistoj, al kiuj ili estas submetitaj.

Veraj burĝoj iĝis apenaŭ videblaj. Oni vidas ilin nur ĉe televido kaj popularaj gazetoj. Tial multaj trompitoj kredas, ke klasoj ne plu ekzistas. Multaj laboristoj eĉ kredas ke ili ne estas laboristoj kaj ilin ofendas la ideo ke ili estas laboristoj: ili estas viktimoj de la reganta unika penso. La ideoj de socio estas la ideoj de la reganta klaso. Tio koincidas kun la materia fakto ke preskaŭ la tuto de amasinformiloj estas en la manoj de kapitalistoj.

Laboristoj ne batalas nur por plibonigo de siaj labor- kaj vivkondiĉoj. Pli ĝuste – precipe ĝuste nun en Francio – ili batalas kontraŭ malbonigo de siaj labor- kaj vivkondiĉoj, gajnitaj de multgeneracia klasbatalo. Tia batalo estas iom vana, vera sizifa laboro, se ĝi ne ankaŭ celas la forigon de la kapitalismo kaj la starigon de senklasa socio.

En tiuj kondiĉoj la bataltago de la tutmonda laboristaro povas esti vera festo.



PETRO LEVI

Jemeno: DNO devas pagi siajn salajrulojn

La norvegia nafto-kompanio DNO ne pagis siajn 175 laboristojn en Jemeno de 18 monatoj. La entrepreno ĉesigis siajn aktivadojn post la milito, kiu okazis en 2015, kaj maldungis siajn laboristojn per simpla SMS aŭ retmesaĝo. Tio ĉi sen respekto al tiuj laboristoj, inter kiuj kelkaj havas 10 jarojn da servodaŭro, kaj malobserve al la proceduro antaŭvidita, okaze de maldungo aŭ forlaso de la lando. La laboristoj do frontas du problemojn: la militon en la lando, kaj la mankon de monrimedoj por iliaj familioj.

Eĉ antaŭe, la entrepreno pagis la plej malaltajn salajrojn en Jemeno, kompare kun la aliaj nafto-kompanioj instalitaj en la lando. En 2013 kaj 2014, la laboristoj organizis plurajn strikojn en rilato kun la salajroj. La direkcio skribe rebatis per minaco de maldungo por ĉiuj strikantaj laboristoj, malobserve al la strikrajto en Jemeno.

Bonvolu montri vian solidarecon kun tiuj 175 jemenaj laboristoj kaj ties familioj, subskribante mesaĝon al la Ĝenerala Prezidanto-Direktoro de DNO, Bijan Mossavar-Rahmani.



Informo el LabourStart

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3295

Brazilo: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la sindikato en la Universitato de San Paŭlo



Kadre de la ondo de atakoj en la tuta lando kontraŭ la laborrajtoj, la prezidanto de la plej granda universitato de Brazilo, la universitato de San Paŭlo (USP), Marco Antônio Zago, persiste daŭras en sia nekaŝita projekto “elimini la sindikatismon en la universitato”. En aprilo, la laboristoj kaj ties defendantoj sukcese luktis kontraŭ la provo de elpelado de la sindikato el ties oficejoj. Poste, dum la decembraj ferioj, la prezidanteco akiris juran decidon por elpeladi la sindikaton el iliaj

oficejoj, se necese per interveno de la polico kaj militistoj. SINTUSP okupas siajn oficejojn en la universitato ekde ĝia fondo ĝis hodiaŭ, akorde kun ĉiuj administradoj.

Iu Prezidanto de universitato jam provis fizike forpeli la sindikaton, kaj tio okazis en 1979, dum la militista diktaturo.

Nun, en la “demokratio” de Zago, la sindikato estas forpelita sen ia ajn intertraktado kaj administra aŭ jura bazo. Temas pri milita deklaro kontraŭ la universitata komunumo, kaj la fundamentaj rajtoj pri organizado de la tuta laboristaro. La direkcio ankaŭ maldungis la sindikatajn gvidantojn, kaj plenumis multajn sensencajn procedurojn kontraŭ la gvidantoj kaj aktivuloj de la SINTUSP. Tiuj laboristoj engaĝiĝas lukti kontraŭ ĉiaj provoj celantaj “elimini la sindikatismon de la USP”.

Informo el LabourStart

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3281

Nikaragvo: Ĉesigu la kriminaligon de la sindikata protestado, forlasu la akuzojn

Dek du akuzitaj laboristoj atendas pundevidon. Ili povus suferi ĝis tri jaroj da malliberejo, ĉar ili protestis kontraŭ la maldungo de siaj sindikataj reprezentantoj. Tiuj laboristoj estis arestitaj en junio 2016, kiam la kontraŭ-ribela polico disigis perforte pacan manifestacion antaŭ la uzino SAE-A Tecnotex, kiu apartenas al korea grupo, en liberkomerca areo en Tipitapa, Nikaragvo. La sindikataj gvidantoj estis maldungitaj post esprimo de zorgoj pri la trinkebla akvo kaj la produktaj celoj.



Informo el LabourStart

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3266

Klimatŝanĝo kaj kapitalismo

Dum la kongreso de SAT en Herzberg en julio 2016, mi prelegis pri tiu temo. Malgraŭ lastmomenta modifo de la salono kaj horaro, ĉirkaŭ 40 partoprenantoj venis debati.

Unue, du asertoj reliefigis diversajn opiniojn kaj reagojn:

– “Klimato ŝanĝiĝas, i.a. plivarmiĝas.”

– “Nuna plivarmiĝo ĉefe fontas el homagado.”

Abstrakta temperaturo

Varmeco de la Tero rezultas el abstrakta averaĝa kalkulo pere de multaj mezuriloj sur tero, ŝipoj kaj satelitoj. Tial, kelkaj homoj dubas pri plivarmiĝo de la Tero, ĉar neniu terano ĉiutage kaj konkrete frontas tiun averaĝan temperaturon. Tamen, multaj homoj rekte konstatas unu el la konsekvencoj, klare mezureblan: la nivelo de oceanoj altiĝis je 19 cm ekde 1900 kaj pli kaj pli rapide altiĝas. Du ĉefaj kialoj klarigas tiun plialtiĝon: la volumeno de la oceanoj pligrandiĝas kaj Teraj glaĉeroj fandiĝas pro plivarmiĝo.

Forcejefikaj gasoj

Dum la pasinta jarcento, glaĉeristoj malkovris rilaton inter temperaturo kaj kvanto de karbondioksido en glaĉero. Ili deduktis, ke neĝeroj, kiuj jarojn post jaroj falis kaj estigis glacieron, enhavas erojn de tiamaj atmosferaj gasoj. Borante glaĉerojn, ili sukcesis mezuri kaj kalkuli koncentriĝon de karbondioksido laŭ la jaroj ĝis antaŭ 40 000 jaroj.



Paralele, klimatistoj konstatis, ke kelkaj gasoj (inter ili karbondioksido, metano, ...) grave rolas en forcejefiko. Sunradioj trairas ilin por varmigi Teron, sed tiuj gasoj malebligas al parto de la radioj forlasi nian

planedon. Danke al ili, ni konservas varmecon, kiu ebligas vivon de plantoj kaj bestoj kiel homoj. Sed pro tiuj gasoj, tiu varmeco povus tro altiĝi, grave modifi la klimaton kaj malaperigi kelkajn vivantajn speciojn.

Rapida plivarmiĝo

Pli kaj pli da sciencistoj opinias, ke industriagado ekde la 19a jarcento akcelas plivarmiĝon de nia atmosfero. Ili kalkulis, ke plivarmiĝo jam okazadis, lastfoje je +5°C dum 7 000 j, inter -17 000 j, kaj -10 000 j. Sed ĉi-foje, ili konstatas kaj avertas, ke plivarmiĝo rapide okazus je +1°C ĝis +5°C dum la nuraj venontaj 50 jaroj.

Por provi limigi plivarmiĝon je 1°C en la nuna jarcento, en la Pariza kaj Marakeŝa konferencoj spertuloj emfazis, ke 80 % de la konataj fosiliaj energioj devus resti en grundo.

Konsekvencoj

Plivarmiĝo malegalas sur la Tero, sed plurajn konsekvencojn frontas multaj loĝantoj kaj vivantaj specioj:

– disvastigo de dezertoj kaj malaltigo de agrikulturaj rendimentoj,

– nivelo de oceanoj altiĝas kaj oceanakvo pliacidiĝas,

– popoloj fuĝas el siaj hejmaj regionoj kaj elmigras ĉefe al apudaj regionoj kaj landoj, malofte al foraj kontinentoj. Spertuloj jam kalkulis la kvanton je 25 milionoj da nunaj rifuĝantoj, antaŭvidas 250 milionojn en 2050 kaj eĉ 500 milionojn, kiuj fuĝos el submaraj teroj en 2100.

Ni ofte aŭdas sloganojn kiel “savu la Teron” aŭ “savu la klimaton”; iel absurdaj laŭ mi, ĉar la slogano devus esti: “savu la homaron”. Spertuloj konstatas rapidan

malaperon de estaĵoj kaj ĝin komparas kun la lasta 5a malapero, kiu okazis antaŭ 65 milionoj da jaroj, famigita per spuroj de dinosaŭroj. Ili opinias, ke la nuna rapideco de plivarmiĝo ne ebligas adaptiĝon de multaj specioj,



Naomi Klein

kiuj malaperos. Ĉu inter ili, homa specio? Dume, la Tero kaj la klimato daŭre ekzistos!

Sed kiu rilato inter klimatŝanĝo kaj kapitalismo?

Krom homoj, kiuj dubas pri plivarmiĝo kaj averaĝa varmeco de la Tero, kelkaj sciencistoj dubas kaj kontraŭas prognozojn pri venanta plivarmiĝo, aŭ pri ĉefa kialo de forcejefiko en plivarmiĝo. Se temas pri sendependaj sciencistoj, gravas aŭskulti ilin por plibonigi komprenon de tiuj fenomenoj.

Nei aŭ prifajfi plivarmiĝon

Sed kiam tiuj sciencistoj estas dungitaj aŭ pagataj de industrioj aŭ ŝtatoj, kiuj eltiras karbon, nafton, gason, kaj aliajn fosiliajn energiojn el grundo, ilin ni ne povas fidi. Ili tutsimple deziras konservi profiton tiel longtempe kiel eble.

Dum la venontaj jaroj kaj dekoj da jaroj, ŝtatoj devos decidi, ĉu ili malebligos aŭ malfaciligos al la firmaoj elgrundigi nafton, karbon, gasojn, uranion ...

En 2007, la prezidento de Ekvadoro, Rafael Correa, kreis fonduson “Yasuni-ITT”. En la nacia parko Yasuni, la ŝtato proponis malpermesi elgrundigi 850 milionojn da bareloj de nafto. Ĝi petis de la internacia komunumo monhelpon je duono de la rezignataj profitoj de 3,6 miliardoj da dolaroj. En 2013, nur 13 milionoj estis kolektitaj kaj la ŝtato decidis ĉesigi la projekton kaj permesi ekspluatadon de nafto. Ĉu iam tiaj projektoj konkretiĝos? Ĉu la metodo taŭgis?

Kapitalismo post ruiniĝo

Aliaj firmaoj, kelkfoje eĉ la samaj, kiuj neas sian respondecon en klimatŝanĝo, vetas en iama ruiniĝo de la homara epoko por tuj vendi portempajn teknikajn solvojn.

Asekuroj proponas multekostajn kontraktojn kontraŭ inundoj, sekeco kaj aliaj klimataj konsekvencoj, kaj limigas repagojn por garanti profitojn.

Entrepreneoj pri publikaj vorkoj konstruas por ŝtatoj kaj komunumoj digojn kontraŭ inundoj, sciante, ke tiuj digoj tute ne efikos, eĉ endanĝerigos loĝantojn kaze de gravaj tempestoj kaj pluvegoj.

Grandaj firmaoj kaj ŝtelistoj profitas fuŝan merkaton pri karbondioksidoj, helpate de ŝtataj subvencioj; procesoj jam okazas.

Teknikistoj laboras por portempe pli-malpli loke modifi klimaton.

Agrikulturistoj kanone sendas kemiaĵojn en nubaron por eviti hajlon kaj ricevi nur pluvon.

Aliaj proponas imiti la vulkanon "Pinatubo". En 1991 ĝi elĵetis sulfurdioxidan gason en la atmosferon. Konsekvence, dum la posta jaro plivarmiĝo de la Tero estis limigita. Do, sciencistoj imagas, ke ili povus fabriki tiun gason kaj peraviadile daŭre ĝin semi en atmosferon por prokrasti plivarmiĝon, malebligante al sunradioj atingi la Teron.

Aliaj proponas forĵeti kemiaĵojn en oceanojn por grandigi ties kapablecon kapti karbondioksidon.

Aliaj proponas lanĉi multegajn satelitajn panelojn, kiuj protektos Teron kontraŭ sunradioj, kvazaŭ sunombreloj.

Firmaoj serĉas rimedojn por modifi, "plibonigi" homojn kaj ilin igi pli rezistemaj al varmeco, sekeco, radioaktiveco ...

Atomenergiaj firmaoj asertas, ke ili

ne partoprenas en tiu plivarmiĝo, kvankam eltiro kaj transporto de uranio, konstruado de atomcentraloj, konservado de radioaktivaj ruboj uzas fosiliajn energion. Prifajfante aliajn gravegajn sanriskojn kaj eternajn riskojn pro atomruboj, ignorante, ke ili ĉefe montris sian malpovon eviti katastrofojn, ili emfazas sian protekton de la klimato... sed tute ne de la homaro.

Kiuj vojoj?

Ekde 1992 en la Ria konferenco, Unuiĝintaj Nacioj kunvenadas kaj konvencias pri klimatsanĝo. Sed de la komenco, ili interkonsentis, por ke la decidoj neniel baru liberan komercon, traktitan de Monda Komerca Organizo. Tial, ekzemple, en tiuj konvencioj ili ne enkalkulas karbondioksidon el mondaj transportoj perŝipaj aŭ peraviadilaj. Sammaniere, ili ne konsideras respondecon de landoj, kiuj fabrikigas aĵojn en malpli monpovaj landoj: en Ĉinio, preskaŭ duono de produktado eksportatas.

Inter la 2 kapitalistaj vojoj, neoj de ruiniĝo kaj kapitalismo el ruiniĝo, ĉu eblus trovi aliajn vojojn?

Antropoceno

Scientistoj proponas nomi nian industriaran epokon "antropoceno" (mi proponas tiun nomon en Esperantujo). Temas pri nova geologia epoko nomita de kemiista nederlanda Nobelpremiito Paul Crutzen. Ĝi ekus fine de la 18a jarcento, kiam homaj agadoj grave ekinfluis la teran ekosistemon. Alia agema artisto, John Jordan, proponas ĝin nomi "kapitaloceno"!

En pasinteco, por retrovi similan



Paul Crutzen

koncentriĝon de karbondioksido kiel la nunan en atmosfero je 400 ppm (partoj el miliono), ni devas reiri al plioceno antaŭ 4 milionoj da jaroj ...

Ĉu homaro, kiu kapablis tiel rapide modifi la medion, sukcesos konservi eblecon pluvivi sur nia planedo?

Klimata justeco

Kiel konkludo kaj por konservi esperon, pluraj sendependaj organizoj proponas rimedojn por repagi klimatajn ŝuldojn. Ili prezentas alternativojn kiel klimatan justecon.

– Ili konsideras, ke ekde antaŭ 3 jarcentoj, riĉigitaj landoj ekspluatadas grundon, laborforton, atmosferon kaj tial ŝuldas al popoloj de regionoj kaj landoj, kiuj ne tiom profitis.

– Ili proponas, ke landoj, kiuj tiel riĉiĝis, pagu laŭ sia historia respondeco kaj pageblecoj al monda fonduso por helpi al energia transirado. Necesus ŝpari konsumadon de energio kaj financi serĉadon kaj disvolvi uzadon de lokaj renovigeblaj energioj.

– Paralele, ŝtatoj devus rekalkuli verajn ŝtatajn ŝuldojn inkluzive tiujn klimatajn ŝuldojn.

– Fine ili proponas, ke ekocido estu rekonata de la Internacia Puna Kortumo.

Tiun prelegon kaj artikolon mi redaktis post legado de multaj dokumentoj, sed ĉefe de grava libro:

Naomi Klein: "This Changes Everything: Capitalism vs. the Climate" (Tio ŝanĝas ĉion: kapitalismo kontraŭ klimato)

GUY MARTIN



Prelego de s-ro Nakajima el Fukuŝima

Ĉu ni povas permesi, ke TEPCO kaj la registaro forĵetu nin kaj Fukuŝima-n?

La 11an de septembro 2016 okazis prelego de s-ro Nakajima Takaŝi el la urbo Sooma en la gubernio Fukuŝima. Li havas malgrandan superbazon de 30 jaroj en Sooma, sed pro la nuklea akcidento li suferas multe.

Li estas la ĉefrepresentanto de la akuzantaro konsistanta el 3 865 homoj. Ili postulas, ke TEPCO kaj la registaro “redonu la vivon kaj la regionon”.

Nun en Fukuŝima ni, 3 865 suferantoj pro la nuklea akcidento, batalas kontraŭ TEPCO kaj la registaro en la juĝejo, postulante, ke ili redonu al ni la eksan vivon kaj la eksan regionon. Multaj el ni ne plu povas aŭ ne plu volas loĝi en sia urbo kaj translokiĝis al fremdaj lokoj. Komercistoj devis trovi klientojn, kaj laboristoj devis trovi novan laborejon tie, sed tio estis tre malfacila. La gubernio donas po 60 000 enoj (600 eŭroj) al tiuj rifuĝintoj kiel subtenon por loĝejo, sed tio estas la sola subteno de la gubernio kaj la registaro. Tiuj rifuĝintoj devas memstare sin vivteni.

Perdita maro

Mi havas malgrandan superbazon en la urbo Sooma de 30 jaroj. Mi loĝas iom fore de la nuklea centralo, do mi ne translokiĝis. Antaŭe mi estis fiera pro tio, ke mi vendas la plej bongustan saŝimi (krudan fiŝaĵon, foto) en mia urbo. Por fari bongustan saŝimi-on, ni devas kombini diversgustajn kaj diverskolorajn fiŝaĵojn, ekzemple salmon, tinuson, salikokon, platfiŝon



S-ro Nakajima Takaŝi

ktp. La maro de Sooma estas fekunda pro akvo enfluanta el la montaro Abukuma. Dank' al tiu fekunda maro fiŝoj estas tre bongustaj. Precipe bongustaj estas platfiŝoj. Ni ĝuis benon de tiu naturo.

Longe oni ne povis kapti platfiŝojn pro radioaktiveco, sed ekde la 1a de septembro estis permesite kapti ilin. Tio estas eble bona novaĵo, sed kiam mi rekomendas tiun platfiŝon al miaj klientoj, certe okazas jena konversacio:

Kliento: Ĉu vere tiuj platfiŝoj estas sekuraj?

Mi: Jes, ĉar la gubernio ekzamenas ĉiujn fiŝojn kaj garantias, ke ili estas sekuraj.

Kliento: Tamen oni mezuras nur cezion, ĉu ne? Kiel estas aliaj nukleajoj kiel stroncio?

Mi: Tion mi ne scias.

Kliento: Do mi ne aĉetos.

Tiamaniere konversacio finiĝas, kaj mi ne povas plu rekomendi tiujn fiŝojn pozitive.

Nun mia filo kuiras saŝimi-on anstataŭ mi, ĉar mi ne estas hejme, laborante por la juĝado kaj prelegante en diversaj lokoj. Dum la pasintaj 4 jaroj, li progresis multe en saŝimi-kuirado, sed lia saŝimi, laŭ mi, ne estas inda je aĉeto. Platfiŝaĵo ludas gravan rolon en saŝimi, sed nun li devas uzi kultivitajn platfiŝojn nutritajn per sardinoj, do la viando gustas sardineca, tute malbongusta. Foje li povas aĉeti naturajn platfiŝojn kaptitajn en aliaj gubernioj, sed



Ne enspiru ĉi tie, sed nur elspiradu !

ili ne estas freŝaj. Antaŭ la nuklea akcidento, mi povis aĉeti freŝegajn fiŝojn laŭ la mendo de klientoj, sed nun tio ne eblas.

Unu jaron post la nuklea akcidento, oni prove kaptis polpojn, kaj mi rekomendis la pecon al juna patro kun bebo. Tamen li rifuzis, dirante, “Mi povus manĝi ĝin, sed mi ne povas doni ĝin al mia filo”. Mi neniam forgesas liajn vortojn.

Sed la registaraj oficistoj diras, ke ni forgesu la akcidenton. Iu profesoro eĉ diradas, ke ni ne timu elmetiĝon de 100 milisivertoj, kaj li estas moke nomata “s-ro 100 milisivertoj”. Internacie oni akceptis 1 milisiverton jare kiel la maksimuman kvanton da elmetiĝo por ordinaraj homoj kaj faras leĝojn laŭ tiu konsento. Ĉu fukuŝimanoj jam havas imunecon kontraŭ 100 milisivertoj? Tute ne, do mi komprenas la opinion de tiu juna patro. Estas natura sento, ke oni evitas danĝerajn manĝaĵojn.

Forgesu kaj ne timu

Sciencistoj kaj kuracistoj ne scias, kiomgrade danĝera estas malaltnivela nuklea elmetiĝo. La registaro kaj TEPCO diras, ke ĉar ni ne scias, ni ne timu. Sed kontraŭe, ni timas, ĉar ni ne

scias, kaj el tiuj nescio kaj timo fontas nia sufero.

La registaro kaj iuj estraranoj de fiŝada kooperativo kritikis min, dirante: “Jam pasis 5 jaroj. Por forviŝi malbonan famon de Fukuŝima kaj por restarigi la gubernion, ni ne plu parolu pri la sufero de Fukuŝima. Ni klopodas por tio, sed vi, Nakajima, subfosas nian klopodon, fanfaronante suferon de Fukuŝima” kaj “Ne timante radioaktivecon, manĝu, trinku kaj ĝuu la vivon. Tio estas laŭdinda sinteno de homoj, kiuj amas Fukuŝima-n kaj Japanion”.

En junio la registaro decidis nuligi malpermeson de loĝado en lokoj, kiuj estas poluitaj je malpli ol 20 milisivertoj. Tuj poste TEPCO klarigis, ke ĝi ne plu donos kompensan monon al la rifuĝintoj ekde aprilo 2017, kaj preskaŭ samtempe la gubernio Fukuŝima deklaris tranĉon de porloĝada helpmono de 60 000 enoj al 30 000 enoj en 2017 kaj al 20 000 enoj en 2018 kaj pli poste ĝi ne helpos.

Tiu mono multe helpas la rifuĝintojn. Certe ges-roj Tanĝi, kiuj rifuĝis ĉi tien, ricevas tiun helpmonon.

S-ino Tanĝi el la partero: “Ni ne ricevas!”

Eĥ, vi ne ricevas tiun monon! Laŭdinde! Vi havas fieron kiel sinceraj homoj! Tamen por multaj homoj estas malfacile vivi sen tiu helpmono. Sen ĝi multaj rifuĝintoj vole nevole devos reveni al sia hejmurbo. Tiamaniere la registaro trudas al ili revenon al la eksa urbo. Sed ĉu ili povos reveni?

Al la urbo Naraha, en kiu homoj nun rajtas loĝi, nur 7% de la loĝantoj revenis. Plejparto de tiuj revenintoj

estas homoj pli ol 60-jaraj kaj kapablaj uzi aŭtomobilon. Neniu familio kun malgrandaj infanoj revenis. Al tia urbo komercistoj ne povas reveni, ĉar ili ne povos vendi varojn al paroj. Junaj gepatroj timas malsaniĝon de siaj infanoj pro radioaktiveco. Ĉu ili povos reveni al la loko poluita je 20 milisivertoj?

En hospitaloj radiografoj kaj en universitatoj esploristoj pri nukleaj aferoj devas sekvi severajn regulojn. Ili povas elmetiĝi al 5,2 milisivertoj jare, sed kiam ili laboras pri radioaktivaĵoj en la laborejo, ili rajtas nek manĝi, nek trinki, kaj kiam ili eksteren iras, ili devas demeti ĉiujn vestaĵojn, kaj nenion ili povas kunporti eksteren. Kiam la registaro trudas al la rifuĝintoj revenon al la loko poluita je 20 milisivertoj jare, tio signifas, ke ili devas loĝi en loko 4-oble pli poluita ol en tiuj esplorejoj kaj radiografejoj. La ĉefministro mem loĝu en la loko poluita eĉ je 100 milisivertoj jare, sed mi ne povas akcepti tiun kontraŭleĝan trudon.

Iam mi demandis la registarajn oficistojn, ĉu ili intencas nuligi tiun leĝon, kaj la respondo estis “Ne”. La registaro, kiu devas observi la leĝon, mem agas kontraŭleĝe. Tio signifas, ke por la registaro ekonomio estas pli grava ol la vivo de fukuŝima-anoj. Ili pensas, ke japana ekonomia progreso estas pli grava ol morto de 100 mil fukuŝima-anoj. Tiu sinteno de la registaro estas kvazaŭ glavo direktita al la popolanoj, ne nur al la fukuŝima-anoj. La registaro pretendas, ke ĝi protektas la japanojn, sed samtempe intencas funkciigi ĉiujn reaktorojn. Se

okazos aliaj akcidentoj, ĝi neglektos kaj forĵetos la suferantojn same kiel en Fukuŝima. Nun ni lernas tiun lecionon kaj fariĝas pli saĝaj.

En aprilo tiun ĉi jaron okazis grandaj tertremoj en la gubernio Kumamoto kaj detruis la faman kastelon. Iuj el miaj konatoj konfesis, ke ili perdis kuraĝon plu vivi, vidante la detruitan kastelon. Neniu antaŭsupozis tiujn du tertremegojn kun la forteco de 7 gradoj. En 1995 okazis granda tertremo en Kobe kaj la urbo detruigis, kaj en 2004 okazis granda tertremo en la gubernio Niigata kaj difektis la nuklean centralon en la gubernio. Ankoraŭ nun TEPCO pledas, ke la nuklea akcidento en Fukuŝima okazis pro neantaŭsupozebla tertremo, sed nun en Japanio, situanta sur la nestoj de tertremoj, iam ajn okazos “neantaŭsupozeblaĵoj”. Tial la elektra kompanioj kaj la registaro devas fari ĉiajn rimedojn por eviti gravajn akcidentojn, sed ne farante tion, ili provas funkciigi plej multajn reaktorojn. En Fukuŝima la registaro intencas fini la akcidenton en 5 jaroj. Tio fariĝos bona ekzemplo por aliaj eventualaj akcidentoj. Suferontoj ne plu povos ricevi helpon de la registaro 5 jarojn post la akcidento laŭ la modelo de Fukuŝima.

Nia batalo

Ni batalas en la juĝejo, sed ankaŭ ekster la juĝejo. Juĝistoj estas elitaj homoj. Certe ili havas kompaton pri la suferantoj, sed se ili verdiktos kontraŭ la registaro, ili ne povos promociiĝi al pli alta posteno. Ili estas homoj, do ŝanceliĝas. Por subteni ilin, batalo ekster la juĝejo estas tre grava. Ni faras du agadojn.

Unua agado estas kolekti multajn akuzantojn kaj subtenantojn, kiam okazas juĝado. La ĉambro de la juĝejo ricevas nur 50 homojn, sed ni kolektas pli multajn kaj manifestacias ekster la juĝejo. Komence kolektiĝintaj homoj estis 150, sed poste 200, pli poste 250, kaj nun kolektiĝas 400 homoj. Oficistoj de la juĝejo kalkulas la nombron. Certe ili informos la juĝistojn pri la nombro. Dum la juĝado tiuj, kiuj ne povas eniri en la juĝejan ĉambro, kolektiĝas en alia konstruaĵo kaj lernas. Ni invitas famajn ekonomikistojn, filozofojn kaj esploristojn kaj aŭskultas iliajn prelegojn. En la ĵurnaloj en la sekva tago aperas novaĵoj pri la juĝado. Tiamaniere ni kuraĝigas la juĝistojn por ke ili ne



Fiŝkaptista ŝipo

ŝanceliĝu kaj verdiktu laŭ sia konscienco.

Alia agado estas vizito al diverskampaj asocioj. Ni jam vizitis 200 asociojn. Fukuŝima estas konservativa gubernio, do loĝantoj emas pensi, ke la akuzantoj estas strangaj homoj, senrespekte kontraŭstarantaj la registaron. Troviĝas Asocio de la entreprenistoj en Fukuŝima, kiun ni vizitis kaj demandis, ĉu la asocio akceptos la proponon de TEPCO, ke ĝi finos doni kompensan monon al la komercistoj kaj kompanioj post du jaroj. La estraranoj de la asocio nun komprenas nian pledon. Tio estas eta sed certa sukceso.

Ankaŭ en Gunma okazas juĝado pri la akcidento de Fukuŝima en la juĝejo de Maebaŝi (la ĉefurbo de Gunma) kaj dum la juĝado vi sukcesis persvadi la juĝistojn viziti la regionon damaĝitan de la nuklea akcidento. Tie ili vidis kaj sentis la mizeron kaj suferojn pro la nuklea akcidento. Ili vizitis senhomajn urbojn kaj vilaĝojn, vidis putrintajn domojn kaj fabrikojn, kaj sentis malĝojon de bovistoj, kies bovinoj postlasite mortis kaj skelete vicis en la bovinejo. Certe la juĝistoj komprenis la kulpon de TEPCO, rekte vidante la realon. Poste ankaŭ juĝistoj en la gubernio Ĉiba kaj en Fukuŝima vizitis la damaĝitajn urbojn. Certe aliaj juĝistoj en aliaj 24 juĝejoj sekvos la ekzemplojn de tiuj tri juĝejoj. Mi kredas, ke per niaj klopodoj ni sukcese haltigas ilian ŝanceliĝon.

Batalo por demokratio

Antaŭ du jaroj mi estis invitita de protestanta eklezio en Frankfurt, Germanio. Post kiam mi prelegis pri la nuklea akcidento al 150 gelernantoj de supera mezlernejo, instruistino, kiu prezidis la prelegkunsidon, diris: “Nun estas tempo por diskutado. Komence mi demandas vin, kial oni konstruis la nuklean centralon en Fukuŝima”. Mi jene respondis:

“Ĉar la marborda regiono estis malriĉa kun malmultaj loĝantoj. Eĉ se grava akcidento okazos, suferontoj aŭ mortontoj estos maksimume 100 miloj. Se okazos akcidento en Tokio, povos suferi aŭ morti 10 milionoj da homoj. Por ekonomia progreso, morto de 100 mil homoj ne gravas. La vivo de Fukuŝima-anoj estas malpli valora ol tiu de Tokio-anoj. Do dekomence konstruado de nukleaj centraloj en Fukuŝima atencis homan rajton, ke ĉiuj homoj estas egalaj. Ĉu vi akceptos tian argumenton?”

Se instruistoj organizus tian kunsidon en Japanio, tuj venus kritiko de gepatroj. Ili opinias, ke tiuj instruistoj estas “ruĝaj”, kaj iuj telefonos al la eduka komitato. Mi demandis miajn konatajn instruistojn pri la ebleco de tia kunsido en ilia lernejo, kaj ĉiuj negative respondis. En la japanaj lernejoj estas tre mafacile trakti politikajn aferojn.

Nia batalo komenciĝis por protekti nian vivon kaj rajton, sed ĝi, evoluinte, celis haltigi kaj nuligi ĉiujn nukleajn

centralojn, kaj nun ni celas ŝanĝi maldemokratian politikon. La batalo daŭras, ne nur en Fukuŝima, sed ankaŭ en Maebaŝi kaj en la tuta Japanio, do ni kunlaborante progresigunian batalon.

Koran dankon pro via aŭskultado.

Ridinda rakonto

Poste okazis diskutado. En ĝi s-ro Nakajima rakontis pri “ridinda vivo de posedantoj de fiŝkapta ŝipo”. Vere la rakonto estis ridinda, sed samtempe plorinda. Jen la rakonto:

Posedantoj de granda fiŝkapta ŝipo ricevas kvantegon da kompensa mono, ĉar ili ne povas fiŝkapti. Ili kaj iliaj familianoj ne bezonas labori. Iu filo, kiu antaŭe laboris kiel fajrobrigadano, ĉesis labori kaj nun posedas aŭtomobilon, kiu kostas 20 milionojn da enoj (200 mil eŭrojn). Iliaj edzinoj nun ne havas laboron, kaj nur manĝas bongustaĵojn, do ili dikiĝas. Por sia sano ili komencis viziti gimnastikejon, vestante sin per multekosta sportokostumo. Ordinara homoj ne volas proksimiĝi al ili, do ĉesis viziti ĝin, sed tio tute ne gravas por la gimnastikejo, ĉar multaj tiaj dikaj virinoj kolektiĝas tie.

Ankaŭ posedantoj de malgrandaj ŝipoj ricevas kompensan monon, sed la sumo estas malgranda, do ili volas komenci fiŝkaptadon plej frue, sed posedantoj de granda ŝipo ne volas tion. Ju pli longe ili ne povas fiŝkapti, des pli longe kaj des pli multe ili povas ricevi tiom grandan kompensan monon. Ili dankas al la nuklea akcidento kaj ne volas ŝanĝi nunan “bonan” situation. Tiuj homoj oficas kiel estraranoj de fiŝkaptista asocio.

Laŭ proverbo, mono kaŭzas ĉion malbonan. Tio estas prava por tiuj fiŝkaptistoj. En Fukuŝima okazas diversaj malharmonioj pro mono: iuj ricevas multe, iuj malmulte, iuj tute ne, laŭ kategorio farita de TEPCO kaj la registaro.

Tradukis HORI Jasuo



Saŝimi

Pri la poemo

Apostolo de la Ideo

La poemon *Apóstol de la Idea*, hispanigo de la originala esperanta *Apostolo de la Ideo*, la juĝkolektivo de la revuo *Caja de resistencia* taksis aperiginda. *Caja de resistencia* estas la plej grava hispana ret-revuo pri soci-kritika poezio.

Apostolo de la Ideo disvolvas temon tiel ligitan al la hispana historio, ke klarigo de ĝiaj ĉefaj ŝlosiloj ŝajnas konvena por la plena kompreno de ĝiaj versoj.

La poemo estas dediĉita al Liberto Maíz, kiu naskiĝis en januaro 2016. Liberto Maíz estas la nomo de la lasta ido de Jorge Maíz, juna hispana anarkiisma poeto amiko mia, kelkajn el kies poemoj mi prezentis en *Sennaciulo*, n-ro 7-8 (1309-1310) Julio-Aŭgusto 2014, en mia traduko. En la hispana, samkiel en la franca, la vorto *libertad* (*liberté*) in-genras. Tial virinoj ricevas la nomon *Libertad*. Viroj, anstataŭ la nomon *Libertad*, povas ricevi la nomon *Liberto*. La familia nomo *Maíz* signifas “maizon”. La poemon mi dediĉis al Liberto Maíz, ĉar mi scias, ke li lernos vivi libere, sine de anarkiisma familio, kaj mi esperas, ke li fariĝos nova praktikanto kaj disvastiganto de “la Ideo”, t.e. de la liberecana idealo.

En miaj unuaj versoj (de *Vi vojaĝis per trajnoj astmaj kaj agonij* ĝis *De ravitoj de l' eĝa lumo de la Ideo*), mi priomaĝas la apostolojn de “la Ideo”, kiuj ekde la dua duono de la 19a jarcento kutime vojaĝis en malfacilegaj kondiĉoj por “prediki” ĝian konsiston en plej foraj vilaĝoj de Andaluzio, kie, dank’ al ili, la idealo de Bakunin forte enradikiĝis.

De *Vi semadis futuron kaj kolektis la plej valoran frukton* ĝis *eĉ la plej etan eĥon viavoĉan* mi priomaĝas la laboristojn, kiuj, reage kontraŭ la Franco’an puĉon en 1936, proklamis anarkiisman revolucion (1936-1939) kaj, por la unua fojo en la mondhistorio, sukcesis transigi al la praktiko la Bakunin’ajn teoriojn en pluraj hispanaj urboj kaj vilaĝoj. La puĉistoj elradikigis eĉ la plej etan eĥon de la voĉo de tiuj mirindaj homoj dum kvardek jaroj da naci-katolikisma faŝismo.

De *Vi kvardek jarojn poste renaskiĝis* ĝis *Oni vin remortigis* mi priomaĝas la homojn, kiuj, post tiu kvardeko da jaroj, ĉe la alveno de tio, kion oni nomas nuntempa hispana demokratio, post la morto de la diktatoro, rekreis la hispanan liberecanan movadon. Ili atingis, ke ĝi havu tian forton, ke la hispana ŝtato,

surbaze de subfosantoj, kiuj talpis ene de la movado, sukcesis abortigi tiun mirindan rekonstruon, kiu kaŭzis teruron kaj al la oligarkio kaj al la de ĝi dresitaj partioj kaj sindikatoj memnomataj maldekstraj.

De *Sed vi plue renaskiĝas ilin spite* ĝis *sed vin ornamis tamen feltharoj Bob-Marley’aj* mi priomaĝas la nuntempajn apostolojn de “la Ideo”, la hispanajn “indignulojn”, kiuj en majo 2011 prenis multajn el la hispanaj placoj kaj tendumis tie kaj, kontraŭstarante la sistemon, tag-post-tage pruvis, ke alia mondo eblas.

La termino “feltharoj” aperas en Vikipedio. Jen la en ĝi legebla difino :

Feltharoj (aŭ rastabukloj) estas *hararanĝo en kiuj la haroj estas kuniĝintaj en dikajn feltecajn tufojn. Ĝi povas okazi nature post longa nekombado kaj estas kutima inter rastafarianoj, kaj nuntempe ankaŭ inter reĝee influitaj junuloj en Okcidentaj landoj. En multaj aliaj kulturoj oni tradicie feltiĝas siajn harojn, interalie ĉe sadhuoj en Barato. En la angla kaj multaj aliaj lingvoj, la nomo de feltharoj estas Dreadlocks. Dread, t.e. « timo » aludas timon de dio.*

MIGUEL FERNÁNDEZ

NEKROLOGO



Frans Jahger

S-ro Frans Jahger, dano kiu loĝis multajn jarojn en Usono, mortis, 93-jara, la 30-an de septembro 2016. Li estis vegetarano kaj membris en SAT ekde la jaro 1949. Liajn librojn estos donacitaj al la Esperanto-grupo en Aŭstino, Teksaso (Usono), cele al starigo de grupa biblioteko.

Informis Lee Miller

Monaj ĉifonoj (1)

Personaro:

1. La ĉifonuloj.
2. Marta, almozulino, senhavulino kun ĵus naskiĝinta infano.
3. Maljunulo, almozulo, senhavulo.
4. Barbulo, almozulo, senhavulo.
5. Homo En Nigro (persono enigmo).
6. Homo En Nigro (kun pugo tro pigra).
7. Lia edzino.
8. Voĉo el ĉielo.
9. La bankistoj.
10. La komercistoj.
11. La servistoj.
12. Komercisto kun granda monsako.
13. La monsako.

Akto I

Sceno 1

En iu grandega urbo surstrate amasiĝas multaj almozuloj ĉifonvestitaj (viroj kaj virinoj mezaĝaj). Ĉirkaŭe de ili abunde videblas reklamoj diversformaj: grandegaj ekranoj kun la reklamo de konsumaj kreditoj, rapidmanĝejaj diverskoloraj emblemoj kun fotoj kaj pentraĵoj de kokaĵoj, de hamburgeroj kaj de fritoj, multege da lumaj reklamaĵoj de la nemoveblaĵoj. Inter ili brilas la elpendaĵo skribita per grandaj nigraj literoj sur blanka fono. La skribaĵo jenas: "Aĉetu la fekon!". Multas la reklamŝildoj, kiuj staras laŭlonge de la strato neimageble dense. (Kelkaj el tiuj ŝildoj estas lumaj, kelkaj – ne.) La strato sufiĉe malpuras.

La ĉifonuloj pro io ekstreme vivoplene gajas kaj laŭte interparolas. Hazarde eksonas vigla muziko.

La ĉifonuloj

(*kantas, samtempe dancante iun neimageblan dancon*)

Nenion havi – jen la task'!
Ne plenen, nek duonon.
Neniu fals', neniu mask'...
Ni falas en neonon.

Vi ĉion vendas, sed ni – ne!
Ni vivas kiel herbo.
"Senpagas sole urinej'",
Tiel diras la proverbo.

Malver'! Valoras eĉ aer'.
Praktik' spertigas male...
Por urinejo la moner'
Gajnendas enbatale.

Alkraĉi nin – facila solv',
Plimulto tiel faras,
Kaj dancas sur fascina polv',
Kaj dancas sur fascina polv',
Kaj dancas sur fascina polv',
Kiam neniu baras.



FOTOMUNTADO: SERĜO SIR'

Preskaŭ ĉiuj almozuloj ĉifonvestitaj iras al maldekstra flanko de la sceno, formante rondon kaj daŭre ion gaje diskutante. Nur du el ili restas: maljunulo, vestita je la soveta oficira ĉiutaga militpalto, laŭ ŝablono de la 70-aj jaroj, kaj iu malpura barba sendenta homo. Post kelkaj sekundoj la homamaso foriras de la scenejo. Laŭ la kontraŭa direkto iras la apartiĝintoj.

Sceno 2

La paro sekvas en iu malpura strateto, kiu estas plena de balaafutoj. Fone komencas soni iu belsona klasikaĵo kaj aŭdeblas sole la konversacio inter tiuj du...

Maljunulo

(gaje)

Kiaj rubuoj – nur trezor’!

La barbulo kapjesas.

Maljunulo

(haste ĉirkaŭrigardante)

Konsentu, kolego, ke tiu rubej’ ne malbonis.

Kaj foriri ni tiam,

Nu, neniel plej multe bezonis.

Kie ĝi estas?

Mi certas ke io tie restas.

Barbulo

(responde, malalloge lispante)

Sed iu ja naskas!

Maljunulo

(malice)

Sed ni ja fiaskas!

Pega fekego!

Ni vane foriris.

La vivo irizis,

Ĉu vi analizis?

Barbulo

(post iom da cerbumado)

Tutcerte, sendube, mia amik’.

Mi tion akceptas sen la polemik’.

Mi tion atestas, samkiel lake’.

Mi tiom damnege malsatas ke...

Subite okazas tondro kaj la lumo verdas dum unu momento. La muziko ĉesas aŭskultebla.

Voĉo el ĉielo

(fersono)

“Rubejo furora!”

“Furiozas malsat’!”

Vi prokuroras

Sen akuzat’...

Maljunulo

(heziteme)

Kiu ĵus blekis?

Barbulo

Mi strikte ne scias, sed mi...

Mi...

(flustre, en la silento)

Ekkfakis...

Maljunulo

(firme)

Kaj mi – ne!

Mi laboris en minej’.

Maljunulo ĉirkaŭrigardas je du flankoj kaj firmkontakte proksimiĝas al la barbulo.

Maljunulo

(rapide, intime, prenante je maniko sian kunparolanton)

Mont’ gravediĝis – musego naskiĝis!

Kadavriĝi ŝi povas – ni ploras.

Ni ploros, memoros, honoros... Sed...

Ŝi mem kadavriĝu, ne iros mi helpi.

Neniu ja helpis al mi naskiĝi!

Ne vidas kialon mi laŭte jelpi.

Kadavriĝu, se destin’ via estas kadavriĝi!

Barbulo

(konvinke)

Ja helpi ni devas

Almenaŭ per io.

Permesas vi morti

Al la apudulo...

Malfruas aborti.

Vi estas tro dura.

Kaj nun iom juĝu:

Ŝi kuŝas surstrate.

Pro l’ frosto ŝi muĝu?

Ĉu?

Maljunulo

Marta!?

Barbulo

Jes, Marta.

Maljunulo


(furioze)

Kiom stultegas la matron’!

Ho, malhonoro kaj malbon’!

Sekvota venontnumero.

ESPOPORE (EVGENIJ GEORGIEV)



Fama hispana rok-ensemblo priomaĝas Esperanton

Ili sin turnis al HEF [1]. La knaboj de la rok-ensemblo Cronómetrobudú projektis nomi sian baldaŭ registrotan k-diskon –la sesan el ĉiuj KD-oj de ili produktitaj ĝis nun– Esperanto. Ili deziris prikanti la esperon. Kaj ili vidis en nia ideo la plej bonan manieron tion efektiviĝi. Ie tie ili do informiĝis pri nia lingvo kaj pri nia literaturo. Kaj trovis en la emblema E-poemo Ho, mia kor', de Zamenhof, aperinta en ties Unua Libro, kiel ni ĉiuj scias, lirikaĵon plej taŭgan al ilia intenco, aperigindan en deklama formo en unu el la kantoj konsistigantaj la KD-on. Ili petis HEF-on pri deklamanto.

Kaj mi ricevis la proponon tion realigi. Mi devas konfesi, ke en la unua momento min ne tro entuziasmigis la ideo kunlabori kun dura-rok-uloj en registro de KD. Kiel sciante, muzike, miaj edukado kaj praktiko esence klasikas. Nuntempe mi tenoras ĉe la plektr-orkestro Calle del Barquillo. Sed, kiam mi telefone parolis kun la kantisto de la ensemblo, Javier Castro, ondo da simpatio min invadis. Aliflanke, ĝuste tiumomente mi ne liberis. Mi estis tuj vojaĝonta Andaluzien. Sed por Javier tio prezentis nenian problemon: “En ordo, telefonu al mi ĉe via reveno, ni prokrastos la registron”, li diris akcepteme.

Kaj mi revenis kaj telefonis al li, kaj ni difinis rendezuon. Sekvatage Javier atendis min ĉe la elirejo de madrida metrostacio. Alta, kalva, kun *piercing*-oj [trapikaĵoj], juna, kvankam ne tro... li, tamen, en konverso, ŝajnis al mi la antitezo de tio, kion oni atendas de tiuspeca dura-rok-ulo. Tenero kaj modesto konsistigis liajn plej karakterizajn trajtojn. Survoje al la studio, li rakontis al mi la celon de la kanto Luna [Luno]. Ĝian tekston li mem verkis; la muzikon komponis Óscar, la violonisto de la bando. Por ĉi kanto la grupo pensis adekvata

la enkondukon de voĉo en deklamo de la zamenhofa juveleto Ho, mia kor'. Ili volis ĉefe ĉi kanton kaj fakte la tutan k-diskon dediĉi al amikino, Lourdes (alnomata Lou), kiu venkis en sia batalo kontraŭ kanceron, perdinte la edzon pro ĝuste tiu malsano. Nekredeble! Mia animo vibradis kvazaŭ forprenita el mia korpo.

Ni alvenis al la studio, unu el la madridaj plejsankejoj de la rokmuzikaj registradoj. Oni tie sonigis al mi la kanton Luna. Kaj ĝi tre pozitive impresis min, malgraŭ ĉiaj malgraŭoj: intence akrajn sonojn el la drumo kaj el elektraj gitaroj sekvis aliaj mildaj el violono kaj el la voĉo de Javier; aliflanke, la teksto montriĝis bela, jen dolĉa, jen amara, sed ĉiam tre zorgita, bonguste kaj lerte frapa:

*Sankta gravito, vi nin haltigas.
Sankta leĝero, vi nin sorigas.*

Entuziasmoplena, mi lokiĝis ĉe la registrobudo. Ricevinte la indikon “kiam vi volos”, mi komencis deklami la zamenhofajn versojn penante laŭiĝi al la ritmo –al la spiritkapta ritmo– de tiu kanto sorĉa kaj magia. Tiumomente mi estis de ĝi tute ravita.

La rezulto kontentigis la teknikiston tiom, ke, liaaserte, ne necesis pliaj ripetoj. Li kaj Javier miris, ke por la

unua fojo okazas tiaĵo. Mi, tamen, petis duan registron por poluri la prononcon de kelkaj literoj.

Nu, tio signis la komencon de bona –kaj mi esperas, ke daŭre fruktodona– amikeco inter mi kaj Javier aŭ, se tiel diri, inter Esperantujo kaj Cronómetrobudú.

Nelonge poste, Javier sendis al mi mp3-kopion de la registrita Luna, kun la peto, ke mi ne diskonigu ĝin ĝis la apero de la KD. Mi tion faris, sed jam de tiam mi komencis kolekti el la budú-anoj mem informojn pri la ensemblo por distrumpeti la novaĵon kaj prezenti ilin al la “verda publiko” en la oportuna momento. Kaj tial, ke la KD aperis la 24an de la pasinta aŭgusto, jen mi faras nun ilian prezenton laŭe al la sobra, konciza kaj rekta maniero, kiel ili deziras esti prezentataj en nia medio:

“Cronómetrobudú estas Burgos'a folkloro metalrok-bando kun pli ol 15-jara muzika sperto. La originala maniero, kiel iliaj membroj kiel tuto frontas la muzikon, igas ilin bazi la sonoron de la ensemblo sur la energio aplikata al la gitaroj, la klasika muziko, la ĵazo, la flamenko, la muziko de Balkanoj... Ili eĉ kuraĝas kanti kanton tute en la japana”.

Mi aldonu, ke, kadre de la metalroko, ili famas ne nur en Hispanio, sed, ankaŭ eksterlande, plej rimarkinde en Meksiko. En ilia oficiala retejo [2] abundas informoj pri ili, pri iliaj diskoj, pri iliaj tre oftaj koncertoj... Kaj en jutubo spekteblas multaj el iliaj ludoj. Sed ĝuste en jutuba paĝo [3] aperas la tuta k-disko Esperanto. La sepa el la dekduo da kantoj tie aŭskulteblaj estas ĝuste Luna, en kies lasta parto aperas mia voĉo en deklamo de la zamenhofa Ho, mia kor'. Ĉi-reteje, alklakante la klapon MOSTRAR MÁS, oni povas legi i.a. mian hispanigon de Ho, mia kor' kaj mian esperantigon de la originala kantoteksto Luna (Louna). Jen ĝi:





Luno (Louno)

*Sidiĝu, rakontu al mi tion, lasu la sunon faldiĝi.
La stratoj nun dormadas, kaj neniu estas ĉirkaŭ ni.
Sidiĝu, rakontu al mi tion.
Ni ambaŭ scias, ke ĉi abismo, kiu ŝvebas super vi,
ne justas, ne.
Jes, mi scias, ne tre prudentas rideti tenante viajn manojn,
temas pri pura timo.
Jes, mi scias, estas senpripense voli haltigi la venton per la manoj,
sed kolero min forprenas.
Sankta ĝravito, vi nin haltigas.
Sankta leĝero, vi nin sorigas.
Sankta ĝravito, vi nin haltigas.
Sankta leĝero, vi iras kaj ne komprenas.
Dume la luno sin kombas en sia dormoĉambro, koketa ridadas,
sin sentas plej sola.
Kaj sube, surtere, la tristaj mortaloj plendadas pri ĉio,
estas povraj kruduloj.
Ĉu vi scias, Luno, ke ili celas nur trompi, sed ne kompreni, vin?
Ĉu vi scias, Luno, ke la plej kuraĝaj ja volas vin havi?
Vin havi, mia Louno, kiu prilumas miajn rozojn,
tiel bela, tiel linda, tiel sola.*

Ĉi-reteje, en la sekcio de kritikoj, abundas laŭdaj opinioj pri la KD Esperanto. Pluraj el ili estas esperantaj notoj el Svena Dun, Esperanto Viva, Asociación Cántabra de Esperanto ks, t.e. fakte, de unu sola homo atentema, zorgema, nelacigebla kaj admirinda: Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu kutime multobligas sian voĉon i.a. favore al la bildo de ni projekciata ekstermovaden. Javier Castro sentis sin tre feliĉa el tio, ke “la esperantistoj reagis, cetere, tre pozitive!”. Nu, vi ĉiuj vokatas fari tute certa tiun entuziasman aserton plej simple: aldonante al ĉi sekcio vian gratulon aŭ viajn vortojn de ĝojo pro la fakto, ke oni donis al la k-disko kaj al unu el ties kantoj la nomon Esperanto kaj elektis la poemon Ho, mia kor’ kiel

esencan parton de la kanto Luna. Temas ja pri apenaŭa peno, kiu, tamen, povas esti tre utila por firmigi la deziron de la budú-anoj plue kunlabori kun ni.

Same, vi ĉiuj vokatas al aĉeto de la k-disko Esperanto. Ĝi aĉetebblas i.a. en la sekcio Tienda (Butiko), de la oficiala retejo de la ensemblo [4]. Cetere, endas instigi niajn libroservojn akiri ekzemplerojn de ĝi por faciligi ties distribuon en Esperantujo. Ni devas atesti pri nia ekzisto, pruvi al neesperantaj artistoj, ke estas inda kaj interesa artumi surbaze de nia lingvo kaj kulturo, malgraŭ la modesteco de nia “verda mondeto”. Ni ne devas fordormi ĉi-specajn okazojn. Ni esperantistoj pasigas duonon de nia vivo plendante, ke oficialaj instancoj, gravaj kulturhomoj kaj renomaj artistoj

preteras nin, sed, kiam iu el ili turnas al ni sian atenton, ni ne malofte turnas al tiu la dorson. Ĉi-okaze ekzistas eblo de plia kunlaboro kun Cronómetrobudú. Javier Castro, la kantisto de la ensemblo, montris al mi simpatian al la ideo iam kanti esperantajn tekstojn. Ni potencigu kaj firmigu tiun ideon.

Dum preskaŭ la tuta monato septembro, niaj amikoj turneis en Meksiko, en sukcesa prezentado de la k-disko Esperanto. Ili konfesis sin mirigitaj de tio, ke iliaj meksikaj fanoj deklamadis al ili parkere la versojn de Ho, mia kor’!!! Krome, en la radio- kaj televid-intervjuoj faritaj al ili tie, la nomoj Esperanto, Zamenhof ks nepre vekis la intereson de la intervjuantoj. Do nia afero estis ofte pritraktata, kvankam pri ĝi niaj amikoj la budú-anoj posedas nur elementajn sciojn.

La 1an de oktobro, Cronómetrobudú faris la unuan prezenton de la KD Esperanto en Hispanio, ĝuste en la urbo Burgos. Mi estis invitita partopreni la koncerton por tie deklami rekte la versojn de Zamenhof kadre de la ludo de la kanto Luna. Kompreneble, ke mi plej volonte akceptis la inviton. Kaj mi povas atesti pri la sukceso atingita de niaj amikoj kaj pri la scivolemo kaj simpatio montritaj de la tiea juna ĉeestantaro al nia afero.


Sanon kaj poezion!

MIGUEL FERNÁNDEZ

- [1] Hispana Esperanto-Federacio
- [2] <http://www.cronometrobudu.com/>
- [3] <https://youtu.be/DkVMkTFGSQI>
- [4] <http://www.cronometrobudu.com/>

-CRONÓMETROBUDÚ- -ESPERANTO-





Ĉu Eŭropa festo ne plu ravas?

Ĉatijlono-ĉe-Indro estas granda vilaĝo centre de Francio inter Turo kaj Kastelruso. Tie vivadas 2 700 loĝantoj.

Ekde la jaro 2008, ĉiun jaron, estas organizita ĉirkaŭ la 14a de Julio (dato de nacia franca festo) semajnfina festivalo "Eŭropaj renkontiĝoj". Tial tra la urbo, ĉirkaŭ la mezepoka kastelo, sur la bazaroplaco kaj ĉe la riverbordo, kuniĝis partoprenintoj de la 13a ĝis la 16a de julio en la oka festivalo. Se komence la ideo fontis el interŝanĝo de ĝemelaj urboj, iom post iom pli ampleksiĝis la projekto. Tiel ĉijare pli ol tri cent libervolaj partoprenantoj veninte el dek ses diversaj landoj harmonie pasigis tri festajn tagojn. En la diversaj eventoj en Ĉatijlono estis reprezentitaj krom Francio, Germanio, Hispanio, Latvio, Slovakio, Ĉeĥio, Hungario, Bulgario, Nederlando, Britio, Italio, Pollando, Slovenio, Rumanio, Belgio kaj... Rusio kaj ankaŭ grupo de grekoj el Parizo! Junaj aŭ ne plu, sportemaj, artistaj aŭ simple fest(en)emaj, ĉiuj kune manĝis, kantis, dancis kaj diskutis. Kiom da lingvoj praktikitaj? Krom ĉies denaskaj, esence la angla kiel pontolingvo. Ofte gest-sign-rid-lingvo. Kaj Esperanto! Ja, loka Esperanto-klubo – Esperanto-Indre – bonintence ŝovis esperantistojn sur la liston de la aktivuloj.

La inaŭgura ceremonio okazis ĉe la monumento al la milit-mortintoj. Tiam unue arma fanfaro ludis la eŭropan

betovenan himnon Odo al ĝojo kaj la nacian himnon La Marsejezo. Dum-momente eblis sin demandi: "Ve! kion do ni faras ĉi tie? Ĉu vere ni miskomprenis la kulturelan celon de tiuj renkontoj?" Sed fine de la muziko iu eksterlanda invitito laŭtigis du kromajn notojn per "pum! pum!"-kantado kaj la tuta placo ekridegis. Poste ĉiu delegacio salutis per pacomesaĝo. Laste sin esprimis FaMo kaj Muriel kantante en Esperanto kanton de Ĵak Brel, La strebo. Tiu duopo trafe kortuŝis la ĉeestantaron kaj ricevis fortajn aplaŭdojn. Por ke vi trafu la fortan silenton, kiu akompanis la emociojn portatajn de FaMo, vi simple sciu, ke apud li larmis virino.

La antaŭan vesperon longa procesio sekvis la akordionon de FaMo kaj la kantadon de La Kompanoj. Ankaŭ antaŭ la bunta, altkvalita, vespera piroteknikaĵo La Kompanoj muzikis kaj kantis famajn kanzonojn en Esperanto. Sed tio estis nur eroj en la multaj kontribuoj de la koloraj delegacioj. Komunaj grekaj dancoj, rusaj kvazaŭbaletoj, polaj grupkantoj... Ja kelkaj vilaĝanoj iel mokeme ridetis al la folkloraj kostumoj de la reprezentantoj de la orienteŭropaj landoj. Eble ĉar okcidentanoj tro ofte pensas, ke ridindas folkloraj. Vilaĝaj ritoj malaperis nome de progreso. Nu konstateblas, ke okcidentanoj ne plu

kapablas surmeti tradiciajn vestojn eĉ okaze de festo, en kiu ili povus reliefigi sian lokan teksaĵan kulturon. Ĉu ne estas domaĝe, ke ne plu eblas distingi diversecon de la vestoj, ĉar ĉiu vestas sin per samstilaj markoj same aĉeteblaj ĉie ajn tra la mondo? Imagu, ke por iel distingi sin nederlandanoj vestis sin per oranĝkolora futbala ĉemizo. Jen, kiel koloro de la nacia futbalteamo iĝas tradicia nederlanda vestaĵo! Ĉu amuze?

Dum mateno en proksima urbeto Loŝo (Loches) politikistoj lokaj, naciaj kaj eŭropaj laŭdis Eŭropon, provante konvinki ĉiujn aŭskultantojn pri la necesa kontribuo de la eŭropaj instancoj al la ĉiutaga vivo de ĉiu eŭropano.

La lastan tagon, kvazaŭ por kampara foiro, sub tendegoj, ĉiuj delegacioj animas landajn budojn. Kompreneble ankaŭ esperantistoj fiere deĵoris por prezenti la internacian lingvon dum ĉirkaŭe eblis frandi diversajn specialaĵojn, trinki alkohol-aĵojn, informiĝi por turismi, ludi, akiri etkoste manlaboraĵojn, ktp. Denove sur scenejo sinsekvis buntaj kantoj kaj multritmaj dancoj. Ĉio en tre simpatia etoso. Esperantistoj rajtas nur bedaŭri, ke ne ĉiuj scipovas la internacian lingvon. Ĉar, se tiel, interŝanĝoj estus pli facilaj, profundaj kaj riĉaj! Tamen ĝojindas partopreni en tiu festivalo!

Notindas, ke Genoveva, la instig-



Dum la parado tra la vilaĝo



Oficiala malferma pacoceremonio




antino kaj ĉeforganizantino de la “renkontiĝoj” estas la edzino de la Ĉatiljona urbestro. Dum la du pasintaj jaroj, horojn ŝi dediĉis al la preparado kaj kunordigado de tiu loka festivalo. Ja ĝi modestas, sed tamen vigle aktivas. Sed ve! Abrupte trafas nin gazetartikolo: Finite! decidis la urbestro. Tri kvaronoj de la konsilantoj voĉdonis kontraŭ la urba propono! Do ne plu okazos tiuj “Eŭropaj renkontiĝoj”. Kial? Ĉu pro monfiasko? Tute ne! Genoveva sukcesis ricevi monsubvenciojn (150 000 €) de Eŭropa Unio por tri sinsekvaj festivaloj kaj interŝanĝoj en kvar landoj. Male do, la urbodomo devos repagi la jam ricevitan ĉijaran subvenciojn (60 000 €) pro tiu ĉes-decido.

Ĉu fermante siajn pordojn al tia okazaĵo, Ĉatiljono ne sentigas iun naŭzan atmosferon, kiu pli kaj pli sterniĝas en tro multaj landoj tra la mondo? Kien vojaĝu junularo, se ne por trovi gastemajn lokojn, kie eblas renkonti malfermajn homojn? Ĉu eĉ en riĉa vilaĝo, centre de Francio, kiu ne suferas pro problemoj ligitaj al enmigrado, la faŝistaj konceptoj de la ekstremdekstrularo (Nacia Fronto) sukcesis forpeli fratecajn kaj egalecajn respublikajn fundamentojn? Kompreneble, ne eblas tuj respondi al tiuj demandoj, ĉar ne tiel aplombe agas la perversaj insiduloj. Tamen indos la venontan majon per lupeo kontroli la rezultojn de la voĉdonoj por la Respublika Prezidento...

Esperanto plu estu prezentata al eŭropa junularo ema al renkontoj. Esperantistoj restu junaj tiucele!

MARCELO REDULEZ



Kanvaso (*)

Ĉi dokumentfilmo ekzamenas la rilatojn kiujn homoj havas kun bestoj sekvante ses malsamajn individuojn, kiuj transiris al veganismo pro malsamaj kialoj. Ekzemple, buĉisto iĝis vegana kuiristo, uzinfarmisto starigis ŝirmejon por savitaj bestoj, profesia sportisto komplete ŝanĝis sian dieton, aktivuloj por bestrajtoj de la movado Animala Egaleco. Plie la filmo esploras historion de veganismo kaj la etikan, median, kaj sanflankan kialojn pro kiuj homoj veganiĝas interjuante gravulojn de la vegana movado.

Recenzo

Tiu dokumenta filmo estis aparte trafa pro la diverseco de la ekzemploj. Ni sekvis plurajn personojn en ilia ĉiutaga vivo kaj evoluo en vegana vivmaniero.

Trafe ni vidis kiel eksa buĉisto, kiu decidis malfermi propran restoracion pri franca kuirarto, iun tagon mem ekkonsciis pri la malkongruco de lia



Vivi kaj lasi vivi

vivmaniero dum li tion faris dum sia tuta vivo ĝis tiam. Malkongruco pro tio ke li ne deziras ke vivulo estu malbone traktata de iu alia. Simple iun tagon, manĝante plej grasan picon, li tion ekkonsciis kaj ekde tiam decidis neniam plu manĝi ion, kio venas el mistraktado aŭ sufero de alia vivulo. Post tio li eĉ decidis malfermi novan restoracion, veganan.

Krom tiu ekzemplo, gravis ankaŭ apogi la fakton ke tiuj veganoj ne nur interesiĝas pri bestaj rajtoj kompreneble, sed ankaŭ pri homaj kaj pri ekologio. Tiel ili ne nur ne manĝas ion el suferigita besto nehoma, sed ankaŭ atentis de kie venas la produktoj, kaj ankaŭ ne uzas ĉokoladon farita de mistraktita afrikinfano ekzemple.

FLORA MARKOV

(*) Laŭ anglalingva Vikipedio

Origine: *Live and let live* (Marc Pierschel)

Oficiala retejo: <http://www.letlivefilm.com/>



Kun la emocioj de FaMo kaj Muriel



La historia memorigado en la kinejo

Tiun ĉi someron, dum mi ĉeestis en la “Zinemaldia”, Internacia Kina Festivalo de San Sebastián (Eŭskio), surprizis min la hazarda konjunkcio de kelkaj filmoj, kiuj parolas pri la socia memoro de militoj, etnaj buĉadoj, politikaj subpremadoj ktp.


Unue, la filmparo “The act of killing” (titolo 2375605 ĉe www.imdb.com, se vi volas serĉi ĝian datumaron) kaj “The look of silence” (3521134), kiuj estis filmitaj en Indonezio kun gravaj riskoj por la teknikistaro (fakte, la plejmulto el ili kaŝas sian nomon ĉe la filmo), montras al ni kiel en lando, kie neniam estis prijuĝita la amasa buĉado de komunistaj kaj aliaj maldekstruloj dum 1966, la murdistoj fanfaronas antaŭ la kamerao pri siaj krimoj kaj eĉ pri la sadista maniero kiel ili agis. En la dua, kuraĝa frato de junulo murdita en tiu jaro vizitas kaj intervidiĝas kun la murdistoj, kaj, tenante la rigardon, demandas kiel? kaj, precipe, kial? Tiuj subpremintoj eĉ ne provas nei la aferon; ili ne kapablas kompreni tion, ke iu pridemandas ilin defiante, ĉar ili ankoraŭ fieras pri la buĉado.

Due, eŭropa-ĉada filmo “Daratt” (0825241) vidigas al ni la konflikton inter la pac-interkonsento aranĝita de politikistoj internaciaj bonvolaj, kaj la tradicie deviga venĝo, sube, inter la civitanoj. Kiam la radioj anoncas en Ĉado la subskribon de pac-interkonsento, avo postulas de juna nepo la venĝon pro la murdo de sia filo, patro de la venĝonta. La scenaro poste montras kiel la junulo, kiu serĉas nur murdiston, trovas homon, kaj devas fari decidon pri la morala eblo de la venĝo.

Trie, paragvaja filmo “Ejercicios de memoria”, reĝisorita de Paz Encina (kiu filmis la eble unuan filmon tute en la gvarania lingvo “La hamaca paraguaya” 0482987), aŭskultigas al ni voĉojn de edzino kaj filaro de paragvaja kuracisto, kontraŭ-


stara al diktatoro Stroessner, rifuĝinta en Argentino kaj malaperigita pere de militistoj dum la “Operación Cóndor” (kaŝita interkonsento de militistaj diktatoroj en Sud-Ameriko por helpi unu la alian ĉe subpremo de rezististoj rifuĝintaj trans la limojn).

Mallongdaŭra filmo hispandevena “La disco resplandece” estas ero en kolektiva turka filmo “In the same garden”, kiu pritraktas la nunajn rilatojn inter turkoj kaj armenoj. En tiu ĉi filmeto, kelkaj junuloj en nokta diboĉado (unu el ili filo de turkaj enmigrintoj, alia ido de armena familio) sentas sin tute fore de la historia konflikto, kiun ili rigardas kiel praan tradicion malinteresan.



Fine, venezuela filmo “El amparo” rakontas veran okazaĵon: antaŭ preskaŭ tridek jaroj, armeo konfuzo pafis kontraŭ aro de fiŝkaptistoj, kiujn ĝi taksis gerilanoj. Du homoj postvivis kaj, eĉ de la malliberejo, luktis dum multaj jaroj por kontraŭstari la malveran oficialan raporton pri la afero, kiu al la armeo, politikistoj kaj amaskomunikilaro konvenas.

La neplanita kunfluo de tiuj filmoj (historia memorigado ne estis la temo de sekcio de la filmfestivalo), pensigas min pri kelkaj nepraj principoj por la socia memoro: neniam ni permesu, ke buĉadoj kaj militkrimoj restu ne juĝitaj (eĉ se pro porpacaj interkonsentoj ili devas aŭ povas resti parte nepunitaj); oni impliku ĉiam viktimojn en la proceso almenaŭ por sinesprimado; oni faciligu la neoficialajn rakontojn; oni bontenu la materialajn aŭ nematerialajn memoraĵojn, sed oni ne trude postulu la venĝon al novaj generacioj.



RICARDO BIURRUN (35.858)

600 mil japanoj estis retenitaj en Siberio

La 19an kaj 20an de aŭgusto okazis la 62a Tutjapana Patrino Kongreso en la gubernio Fukui kaj Išikaŭa. Mia edzino, aktivulino en tiu kampo, invitis min al tiu kongreso. Profitante tiun okazon, ni planis viziti la “Muzeon de japanaj retenitoj en Siberio”, situantan en la urbo Maizuru en la gubernio Kioto.

Post la japana modernigo en la 1860-aj jaroj Japanio etendis sian avidan manon al Tajvano, Saĥaleno (insulo en Orienta Rusio) kaj suda Pacifiko, kaj en la 1920-aj jaroj ĝi komencis invadi Ĉinion, sudorientan Azion kaj la tutan Pacifikon.

Kiam Japanio malvenkis en la dua mondmilito, vivis 6,6 milionoj da japanoj en tiuj regionoj. Multaj sukcesis relative bonorde reveni al Japanio, sed 600 mil japanoj retenitaj de Sovetunio havis grandan malfacilon. Multaj el ili estis plu transportitaj al aliaj landoj kaj regionoj kiel Ukrainio, Kazaĥio, Uzbekio, Mongolio ktp kiel montriĝas en la mapo.

Ekde la jaro 1947 tiuj retenitoj en Sovetunio komencis reveni al Japanio, kaj la revenado finiĝis en 1956. Ili revenis al 10 japanaj havenoj, el kiuj la haveno Maizuru funkciis plej longe ĝis septembro 1958.

En la Muzeo la ĉefa temo estas la vivo de tiuj retenitoj en Siberio. En la taglibro de Seno Osamu (1908-1995), skribita sur ŝeloj de betulo, oni povas legi jenajn tankaĵojn kaj hajkojn pri iliaj familio kaj malfacila vivo en Siberio:

Mia patrino faris varman miksaĵon de sakeo kaj ovo por mi suferanta pro malvarmumo. En la kampo elhakita en betularbaro, ni ĝoje rikoltis terpomojn, kvankam la kvanto estis malgranda. Ni metis kadavrojn en la ĉevalĉaron, apude malĝoje staris arboj. Super la vintra arbaro komenciĝis luna eklipso meznokte. Al ni kuŝantaj kun mantelo sur ni ventetis tra fendoj en malvarma vintra nokto.

Retenitoj kaŝe kunportis tiujn kajerojn hejmen, kaj tiuj estas registritaj kiel mondaj memorheredaĵoj de UNESKO.

Post la dua mondmilito estis kantataj multaj kantoj temantaj pri tiuj spertoj en la sovetuniaj koncentrejoj. Unu el la plej famaj kantoj estas “Patrino sur la kajo”. Tiu patrino, nomata Haŝino Ise, atendadis la revenon de sia filo sur la kajo de la haveno Maizuru. La kanto tekstas:

*Mi venis ĉi tien ankaŭ hodiaŭ,
Al tiu kajo mi venis ankaŭ hodiaŭ,
Mi scias, ke mia revo ne plenumiĝos,
Sed mi venis, esperante, ke la hazardo okazos.*

(Monologo)

Revenis denove la ŝipo kunportanta retenitojn, sed mia filo ne revenis. Ĉu vi ne povas vidi min staranta sur la kajo? La nomo de la haveno estas Maizuru, fluganta grupo. Kial vi ne revenas, flugante? Se vi ne povos reveni, alparolu min eĉ per unu vorto...

En la muzeo estis montritaj fotoj kaj leteroj de s-ino Haŝino. Ŝi loĝis en Tokio kaj ekde la jaro 1950 dum 6 jaroj ŝi vizitadis la havenon Maizuru, kredante, ke ŝia filo revenos. En septembro 1954 la ministerio de bonfaro oficiale anoncis al ŝi, ke ŝia filo mortis, kaj en 1956 Tokio anoncis, ke li mortis en la batalo en la urbo Mudanĵiang (牡丹江) en la nordorienta regiono de Ĉinio.

Sed surprize, laŭ interreta informo, li postvivis la militon kaj vivis en Ĉinio post la milito. La artikolo skribiĝas jene:

Ŝia atendata filo vivis post la milito. Tio klariĝis en 2000, post la morto de lia patrino en 1981. Li estis kaptita de Sovetunio kaj transportita al Siberio, kaj pli poste li estis transportita

al la nordorienta regiono de Ĉinio kaj servis por la Okavoja Armeo de Ĉina Komunista Partio. Poste li vivis en Ŝanhajo kiel radiografo kaj faris familion. Li sciis, ke lia patrino atendas lin en Maizuru, sed li ne kontaktis ŝin. La kialo ne estas klara. Ekde 1996 li trifoje renkontis la grupon, kiu vizitis Ĉinion por konsoli japanajn militviktimojn, sed li rifuzis reveni al Japanio, dirante, ke oni kredas lin morta, do li ne povas reveni tiel malfrue.

La jaro 2016 estas la 60-jara datreveno de la fino de la reveno de la retenitoj el Sovetunio. Kial ĝi detenis tiujn japanojn? La Muzeo klarigas jene:


Sovetunio suferis multe pro la dua mondmilito, perdinte multege da homoj kaj proprietaĵoj, tial ĝi bezonis laborforton. Samon ĝi faris por germanaj kaptitoj.

Tamen troviĝas alia argumento, ke laŭ sekreta promeso inter Japanio kaj Sovetunio, Japanio mem proponis, ke tiuj japanoj laboru en Sovetunio. En la artikolo “Kio estas deteno de japanoj en Siberio?” en la ĵurnalo Akahata la 24an de aŭgusto 2016 estas skribite jene:



Retenitaj japanoj dividas malmultan manĝaĵon egale per pesilo. Supre en iom pli varma loko kuŝas malsanulo. Apude staras sovetunia soldato.

- pli ol 20000 detenitoj
- pli ol 10000 detenitoj
- malpli ol 10000 detenitoj
- △ multaj detenitoj



Koncentrejoj por japanoj

Antaŭ ol Stalin sekrete ordonis la detenon de japanoj, li ordonis, ke Sovetunio ne transportu japanajn kaptitojn garnizonantajn en la nordorienta regiono de Ĉinio. Kial li ŝanĝis la ordonon? S-ro Ŝirai Hisaja, reprezentanto de la Esplorcentro de la historio inter Japanio kaj Rusio, klarigas jene:

La ĉefstabo de la japana armeo proponis, ke Sovetunio libere disponu japanajn kaptitojn por la Ruĝa Armeo. Tiujn dokumentojn skribitajn de la japana armeo s-ro Saitoo Rokuroo, la unua prezidanto de la Societo de la detenitoj kaj kaptitoj, trovis en arkivo de Sovetunio.

Unu el tiuj dokumentoj estas tiu de Sejima Rjuuzoo, ano de la ĉefstabejo. En ĝi li proponis, ke Sovetunio uzu laŭ sia volo japanajn kaptitojn por la Ruĝa

Armeo. Alia dokumento skribita de Asaeda Ŝigeharu, ankaŭ ano de la ĉefstabejo, proponis, ke japanaj kaptitoj loĝu en Koreio aŭ nordorienta Ĉinio sub la reĝo de Sovetunio kaj tiuj, kiuj loĝados tie, perdu la japanan ŝtatanecon.

S-ro Saitoo kolere kritikas la japanan registaron, kaj diras en sia libro: "Post la milito multaj japanaj enmigrintoj estis postlasitaj en nordorienta Ĉinio, ĉiuj viroj estis mobilizitaj al la batalo kaj la kaptitoj estis transportitaj por la uzo de Sovetunio. Tiuj decidoj ne estis simplaj eraroj, sed intence faritaj. La detenitoj, tute ne sciante la fakton, morte dormas en fremdaj lokoj".

Sovetunio planis detale pri la utiligo

de japanaj kaptitoj kaj faris dokumentojn pri ĉiuj. Lastatempe 700 mil kartoj kaj materialoj pri tiuj estis transdonitaj al Japanio. Nun, kiam iliaj familioj petos la dokumentojn, la registaro donos tiujn kun traduko en la japanan lingvon. Sed ankoraŭ nun ne estas identigitaj 15 000 mortintoj, kaj pli ol 35 000 mortintoj dormas sub la frosta tero. La ministerio de bonfaro trovis 224 tombejojn, sed tiam troviĝis pli ol 2000 koncentrejoj.

En la muzeo de Maizuru, oni tute ne mencias pri tiuj faktoj, nek pri tio, kial japanoj garnizonis en nordorienta Ĉinio kaj estis kaptitaj. Oni kaŝas la japanan invadon en Ĉinio, kaj nur apelacias emocie al la vizitantoj pri la mizero de la vivo de kaptitoj en Sovetunio.

Dum la dua mondmilito tri milionoj da japanoj mortis, el kiuj 2,4 milionoj mortis ekster Japanio. La registaro lastatempe komencis klopode kolekti tiujn cindrojn, sed 1,13 milionoj ankoraŭ dormas en fremdaj lokoj. Jam postvivantoj de la milito malmultiĝas, do informoj pri la morto de tiuj militmortintoj same malmultiĝas, tial bedaŭrinde plej multaj mortintoj ekster Japanio devos dormadi, kie ili mortis, neniam revenonte al sia familio.



Taglibro de Seno Osamu (1908-1995) skribita sur ŝeloj de betulo

HORI JASUO

25-AN DE AŬGUSTO 2016



Estas urĝa tempo reeki al atako !

Antaŭ kelkaj monatoj en Francio aperis la penso de Bernard Friot, kiun li disvastigas per prelegoj kaj agado de la asocio “Salajrec-reto” [1]. Tiuj ideoj estas, mi taksas, ege gravaj, ili restartigas la socialisman pensadon, kiu estis dum multe da tempo gurdanta en diversaj sakstratoj, kaj malfermas novajn pensoperspektivojn. Kaj ilia originaleco kuŝas eble ĉefe en tio, ke malgraŭ la ŝajno esti “freneze utopia” je la unua vido, ĝi estas ne nur tre sagaca kaj plenbaza analizo, sed fakte JAM EKZISTAS kaj funkcias, glate, en multaj landoj (ĉiuj, kie Sociala Sekureco – do la tuta san-sistemo! – la pensioj de emeritoj, la porinfanaj kromsalajroj de gepatroj, estas financataj de kotizoj, aldonitaj al ĉiuj salajroj, kaj kie ekzistas iu speciala privilegia statuso por la ŝtatoficistoj), do la kerno de la ideo estas 1-e kompreni, ke tio ne estas banala “solidareco” nek “asekuro”, sed rezulto de klasbatalo venkinta en 1945, tute alia maniero koncepti la kreadon de la valoro, kaj 2-e pensi: kial ni ne irus plue? Ĝin etendi al la plena plusvaloro kaj krei ekonomion sen labormerkato, sen bankoj, sen pruntistoj!

Ni legu la jenan artikolon, verkitan de unu ano de la “Salajrec-reto”.

Estas urĝa tempo reeki al atako!

Tempo por sociala elpensemo

Se la NKR (Nacia Konsilantaro de Rezistado, politika ento kreita en Francio en 1944 por kunigi ĉiujn diversajn movadojn de rezistado kontraŭ la nazia okupanto) laboris por liberigi Francion dum la Okupado, ĝi ankaŭ scipovis pensi la estontecon kaj verki programon tre ambician (“La

feliĉaj tagoj”), cele al la tempo post la liberigo. Tiu politika projekto, tiel elpensita en kaŝeco, en 1944, tre rapide efektiviĝis, en 1945 kaj 1946, sub la alta inspiro de Ambroise Croizat, ministro de la generalo de Gaulle. Profitante de favorega situacio (komunista partio flirtanta kun 30 % de la voĉodonoj, sindikato forta pro 5 milionoj da aliĝintoj, mastraro hontigita pro sia kompromitiĝo kun la nazioj dum la Okupado), li trudis socialan politikon vastskalan, ĝis tia grado, ke ĝi donis novan difinon de la valoro.

Ni ĉi tie rememorigu la vastecon de tio, kio estis en mallonga tempo realigita pro la agado de 5 komunistaj ministroj: konstruado de la sistemo de sociala protekto (kaso de asekuro kontraŭ malsanoj, de familia kromsalajro, de ĝenerala reĝimo de pensioj), plibonigo de la laborrilita leĝaro (entrepreno-komitatoj, reguligo de la kromhoroj, labora medicino), plivastigo de la statuso de la publikaj oficistoj (tion efektiviĝis Maurice Thorez), ŝtatigo de multaj entreprenoj. Kiel la unuan fojon en la historio, la



Ambroise Croizat

laboristoj sociigas la produktadon ĝis grado de 32% kaj liberiĝas de la karitataĵoj. Ni aldonu, ke ili mastrumas mem ĉiujn tiujn kasojn (iliaj elektitoj okupas la plejmulton de la seĝoj), kio montras ilian kapablon pri memmastrumo, kio estis tiom ofte neita de la mastraro.

La 4-a Respubliko ekas, kaj Francion oni devas rekonstrui. La francoj naskas infanojn, multajn infanojn, kaj tiu politiko favoras novan akcelon. Endas lernejojn krei, kapabligi kaj pagi bazlernejajn instruistojn. Sammaniere, la fako pri sano disvolviĝas rapide, danke al la leĝdona dekreto de la 4-a de oktobro 1945 pri Sociala Sekureco. Tiu protektsistemo garantias aliron al flegado por ĉiuj. La malsanulejoj frontas mendadon je flegado pli kaj pli altgradan deflanke de la laboristoj kaj iliaj rajthavantoj. Nia sociala modelo ekiras, kiun ĝuos ĉiu, kiom ajn estas iliaj laborenspezoj. Tiu politiko grandparte kontribuas al kreskigo de vivdaŭro. La infanoj estas pli bone nutrataj, la laboristoj pli bone protektataj, la emeritoj pli bone flegataj. Precipe la estonteco ŝanĝas la koloron, la timo pri la morgaŭo iom post iom malaperas, ĉar ĉiu estas pli bone protektata kontraŭ la vivhazardoj, per la kotizo.

La tempo de malvenko

Tion neniu primiros: la alta mastraro ne povas toleri tian pliboniĝon. Ni memoru la jarojn 60-ajn, kiam la dungito aŭdacis rifuzi laborpostenon – ĉar ne sufiĉe pagatan, aŭ tro penigan – certa li estis, ke li trovos alian ekde la sama tago! La fortorilato estis al li favora, tio estas necesa kondiĉo por liberiĝi. Krome, la kotizoj plialtiĝadis ĉiujare,

malpliigante iom post iom la kvoton de la profitoj. Se socialismo ekzistis oficiale en la oriento, en la sovetia bloko, ĝi iel ekzistis ankaŭ ĉe ni, sub formo miksitaj. Ni rimarku preterdire, ke inflacio regis, kaj plenumis determinantan rolon: la mono de la plej riĉaj perdadis je valoro!

La demando, kiu metiĝas, do estas la jena: de kiam oni povas dati la komencon de la kontraŭ-atako? Ĉiuj niaj akiriĵoj disfadeniĝis, ĝis ili perdiĝis el nia memoro, de unu generacio al la sekva. Oni devas rimarki, ke tiuj luktoj ne estas instruataj en la lernejoj! Kiu en Francio konas Ambroise Croizat (ambroaz' kroaza)? François Billoux (fransoa' biju)? Marcel Paul (marsel' pol)? Nur de Gaulle plurestis en la historio, ĝis tia grado, ke li estis rigardata kiel la patro de la Sociala Sekureco! Dum estas li, kiu direktis al ĝi mortigan baton en 1967, redonante al la mastraro la povon estri la kasojn. Ĉion tion oni forgesis, sed la faktoj estas obstinaj. La komunista partio estis malpli vigla, kaj CGT [2] perdis iom de sia influo. La generalo profitis de tio.

Dum paso de la jaroj, la kondiĉoj malrapide malboniĝis. La repago de la kurackostoj transiris de 80 % al 65 %. Malsanuleja pensio-pago estas kreita, kaj regule altigita. La kresko de la kotizoj estas haltigita en la jaroj 70-aj, dum rimedoj favoraj al impost-deprenoj aperis, avantaĝe al la plej

riĉaj. Ĉiuj registaroj kovis siajn "reformojn", ne nur la dekstraj, sed eĉ pli la "maldekstraj", en la daŭro de la 80-aj jaroj. Sufiĉas pensi al la liberala turniĝo de 1983, sub anglosaksa premo, aŭ al la akcelo al la borsa indico en 1992, fare de Pierre Berezogovoy! La deŝtatigojn oni multobligis, sub ĉiuj registaroj, ekde tiu de 1986, estrata de Jacques Chirac, al tiu de Manuel Valls nuntempe.

Estas necese emfazi tiun perdon de la nacia suvereneco per eŭropa integriĝo kaj kreado de l' eŭro. Niaj komunistaj ministroj de 1945 tre certe rifuzus la Eŭropan Union tian, kia ĝi ekzistas: ni estas devigataj nin konformigi al la postuloj de tiu establo, kiu ne konsideras niajn konkerojn, sed tute male, nin senposedigas de ili. Niaj regantoj obeadas al ĝi, ĉar ili eĉ ne plu havas la povon ĝin rezisti, ĉe se ili tion volus [3]. Ĉiuj decidoj estas farataj en Bruselo. La premgrupoj subaĉetas niajn deputitojn, en la direkto de la "reformoj" plej malprogresaj. Ni ne plu faras la leĝojn, tion faras nun la multnaciaj firmaoj. Eĉ niaj investoj estas submetitaj al la merkato, kiu al ni trudas prunteprenadon ĉe privataj bankoj, kio plikreskigas nian ŝuldon.

Sed tiu konflikto evoluas dum kelkaj jaroj. La malamiko prezentas sin nun malkaŝe. Ni rememoru la eŭropan intertraktaĵon, kie nia volo estis piedpremita de niaj deputitoj dum la prezidanteco de Nikolas Sarkozy. Etapon ili transiris, kie la povo ne plu

surhavas maskon, kaj humiligas nin malkaŝe. La sociaj movadoj ne plu estas aŭskultataj kaj la voĉdonado de la franca popolo estas piedtretata.

Tiom maltrankvilige estas, ke niaj socialaj konkeraĵoj suferas saman traktadon. Sufiĉas legi la artikolon aperintan en la revuo "Challenge", la 4-an de oktobro 2007, kie Denis Kessler, tiama vicprezidanto de la franca organizo de la granda mastraro, MEDEF, malkaŝas la koheron de la "reformoj" okazantaj. La celo estas "metode malfari la programon de la CNR (la dumilita, 1944-a, Nacia Konsilantaro de la Rezistado)". Li trafas konscias la kontraŭkapitalisman econ de tiu programo kaj la laboraron ĝin detruantan. Li apogas la registaron de François Fillon, kiu tiam estis atakanta la statuson de la publikaj oficistoj, la specialajn reĝimojn de pensioj, samkiel la socialan sekurecon. La celo de tiu disrabado klaregas: igi nin pli konkurkapablaj en la tutmonda tereno, tio estas nin laŭliniigi al la plej senkompataj socialaj reĝimoj.

Alia artikolo indas atenton, tiu freŝe aperinta en la gazeto "La Tribune", la 16-an de februaro 2016, kie Nathalie Kosciusko-Morizet proponas "forigi la statuson de la ŝtatoficistoj" aŭ almenaŭ "limigi ĝin al kelkaj alte regaj postenoj". La celataj sektoroj ne estas nomitaj, sed tre certe temas pri edukado kaj sano. La projekto tre klaras kaj strebas konformigi la publikan dungstatuson laŭ la laborleĝaro de la privata sektoro, ĝis samaj mastrummetodoj. Ŝi planas proksimigi la konkursajn laborpostenojn al la kontraktoj de la privata sektoro, kio estus la plej bona maniero fari "tabula rasa", vakan tabulon! Ni ĉi tie memorigu, ke la statuso de la ŝtatoficistoj, fundamentita sur la konkurso, ebligis fondi la dumvivan salajron, politiko defendata de la "Salajrec-reto", ĉar ĝi ebligas sin liberigi de la dungantoj. Sed sinjorino Kosciusko-Morizet ne haltas tie, kaj metas la minacon super la sendunguloj, aliaj ĝuantoj de rudimenta dumviva salajro sub formo de pluigata salajro. Ŝi rekomendas "malprogresivecon de la monkompensoj pro sendungeco, laŭ la nombro da validaj laborpostenoj rifuzitaj". Jen ni estas antaŭsciigitaj pri tio, kio atendas nin, kiam ŝia partio revenos al la povo en 2017. Ĉiuj niaj konkeraĵoj estas en la pafcelilo.



Bernard Friot



Nathalie Kosciusko-Morizet

La kialoj de tiu malvenko

Necesas kulpigi la registarojn, sed endas ankaŭ praktiki memkritikon kiel eble plej honeste klarvidan. Se ĉio misiĝis de duonjarcento, pri tio ni parte respondecas. La kapitalistoj kaj iliaj aliancanoj – tio estas ĉiuj partioj enpotencigitaj – trudis al ni sian konceptadon pri la realo, kaj ni konsentis pri ĝi! Ni prenis sur nin ilian analizon, kaj praktikas la “novparolon” kiun ili kreas entute. Ni ne plu parolas pri “kotizo” aŭ pri “sociigo de la valoro”, sed pri “socialaj kostoj”! Ni glutas obeeme ĉiujn iliajn fabelojn, interalie la oficialan rakonton pri la “tridek jaroj de ekonomia belvetero”, la mensogojn pri la laŭdira deficiĵo de la Sociala Sekureco aŭ la demografiajn prognozojn pri la financado de la pensioj. Ni kredas je la neceso de kredito, harfendas pri la jaraj pagoj, kaj postulas plenan dungitecon! Ĉiuj niaj sloganoj rolas kontraŭ ni kaj ĉirkaŭas nin en niaj malvenkoj.

Same, la disfalo de la berlina muro en 1989 paralizis nin. La potenco havis belan ŝancon konsideri ĝin kiel la morton de komunismo kaj prezenti kapitalismon kiel la ununuran eblan sistemon. Ni tamen scias, ke la komunismo ne okazis. Neniam. Nenie. Nek ĉe Stalino, nek ĉe Mao, nek ĉe Kastro. Temis pri ŝtatkapitalismo, burokrateca, kiu estis denuncita jam en 1918 fare de la revuo *Kommunist* (Buĥarin, Smirnov, Radek) en USSR,

kaj kelkajn jardekojn pli poste en Francio fare de Guy Debord kaj Jean-François Lyotard. Ni tamen akceptis tiun aserton, kaj klinis la nukon.

Finfine, alia eraro niaflanka, ni lasis kredi, ke la komunismo celas malposedigi la burĝon de lia domo. Jes ja, ni volas neniigi la privatan posedon, sed nur tiun de la produktrimedoj! En la mondo, kiun ni volas, ĉiu povos konservi sian karan hejmon, tio estas memkompreneblaĵo! La komunismon de la maŝinoj ni volas, la uzad-kunposedon de niaj fabrikoj, de niaj oficejoj, kaj ne la gulagon por ĉiuj! Temas nur pri tio kiel fini la sklavecon de dungeco, kiu trudas al ni la flekseblecon, la inferajn kadencojn, la distranĉadon de la taskoj, kaj ĉion por nur transvivsalajro.

La horo vekigi

Jes ja, necesas eliri el Eŭropa Unio [4], verki mem nian konstitucion [5], rifuzi pagi ilian “ŝuldon” [6], kaj krei mem nian monon [7], sed tio ne malhelpu nin agi ekde nun je la nivelo de la sociaj bataloj. Temas pri replenumo de nia historio tie, kie ni ĝin forlasis, sur la fundamento ellaborita de la Nacia Konsilantaro de Rezistado, kaj de ĝia efektivigo en 1945. Ni ne povas plu resti tiel, nur defendaj, provante vane savi la meblojn en la katastrofa brulego. Niaj luktoj devas ŝanĝiĝi laŭ naturo, kio estas la ununura rimedo, kiun ili havos por akiri allogpovon.

Tiu laboro, konjekteble longdaŭra, estas la celo mem de “Salajrec-reto”. Ties teoria aliro estas plej decidforta, kaj la ununura rimedo, kiun ni havas por eviti la erarojn de l’ pasinteco. Tiu aliro ebligas al ni returni la vortrezoron, ĉar la lukto plenumiĝas en la vortoj, por malfermi mensojn. Ni prenu la ekzemplon de la laŭdiraj “publikaj elspezoj”, tiom ofte aludataj, kiam oni parolas pri la ŝtatfunkciuloj. Temas tie pri produktado de valoroj – plej utilaj – kiuj altigas nian Malnetan Enlandan Produkton. Ni ree asertu: niaj ŝtatoficistoj produktas servojn, kiujn ni bezonas. Tiu laboro, kiun ili plenumas, estas bonefika al ĉiuj, multe

pli ol se en la manoj de la privata sektoro, ĉar ĝia celo ne estas la profito por kelkaj sed tutsimple la komuna bono. Se kelkaj problemoj restas en la kvalito de ilia laboro, tio estas, ĉar ili estas malliberuloj de la politika potenco, kaj ne estas kunposedantoj de siaj laborrimedoj.

Nia asocio pledas por fondo de vivdaŭra salajro por ĉiuj, ekde la aĝo de 18 jaroj. Tio ne estas utopio, ĉar la vivdaŭra salajro jam ekzistas, eĉ se ĝia ekzisto ne estas ekplicate dirita. Ĉiuj ŝtatoficistoj ĝuas tion, laŭ siaj gradoj, ricevataj per konkursoj. Ili ĝuas tiun salajron dum sia tuta vivo, kaj ne povas ajnkaze esti eksigitaj. Same la emeriteco prezentas alian formon de tiu vivdaŭra salajro. La pagataj pensioj estas neforpreneblaj, kaj estas financataj de la socialaj kotizoj elŝirataj el la profito.

Konsiderante, ke ĉiu estas produktanto de valoro dum sia tuta vivo, ni proponas vastigi tiun principon al ĉiuj civitanoj, kio estas redisdoni al ili tiun valoron, tial ke produktas ĝin ili! Ĝis nun manpleno da rabbestoj senposedigas nin de ĝi, por ludi en la borso kaj redukti nin al mizero. Sed tio neniel estas fatalo. Ni povas establi la uzposedon de ĉiuj niaj produktrimedoj, kaj tiamaniere senbalastiĝi je la dungantoj. Ni povas egale malhavi la privatajn bankojn, memfinancante ĉiujn niajn investojn pere de la sociala kotizo. Ni devas unuavice konsciigi, ke certaj institucioj jam ĉeestas, sur kiuj ni povas baziĝi. Ĉar fakte la revolucio okazis en 1945. Ni kreis la statusojn de la publikaj oficistoj, la kasojn de la sociala sekureco, la reĝimon de pensioj, ktp, tio estas la institucioj reale revoluciaj. Per remalkovro de tiu heredaĵo, ni volas ĝin defendi, sed ankaŭ igi ĝin iri pluen. Se bone pripensi, tio estas nur demando pri politika volo.

XAVIER MORIN, ANO DE LA “SALAJREC-RETO”.

Esperantigis Roland Platteau majo 2016.

Notoj el la tradukisto:

- [1] France Réseau Salariat.
- [2] La komunista sindikataro Ĝenerala Konfederacio de l’ Laboro.
- [3] Bone vidigiĝis nelge en Grekujo.
- [4] Vd François Asselineau.
- [5] Vd Etienne Chouard.
- [6] Vd Eric Toussaint.
- [7] Privilegio de la ŝtata banko.

Impresegoj el la SAT-kongreso

Ĉijare mi facile povis partopreni la SAT-kongreson pro emeritiĝo. Kiel flegisto mi ne rajtis ferii dum la somera sezono, ĉar rezervita por familioj.

La urbo Herzberg (Herckerk) signifas por mi la revenon al malamata patrujo, la granda Germanio de la tria (miljara) regno.

Kiel indiĝeno mi facile trovis spurojn ankaŭ en la E-urbo Herzberg. La ĉefa strato ankoraŭ nomiĝas laŭ la lasta kanceliero de la respubliko Weimar (Vajmar), generalo Hindenburg. Estis tiu militisto, kiu donis potencon al la diktatoro Adolf Hitler, cetere elektita demokrate de la germanaj popoloj. Pri la militeca pasinteco de Herzberg mi verkis unupaĝan artikolon por kunveno de la komunista frakcio. Mi titolis ĝin: Herzberg tra okuloj de laboristo. Por la kunveno mi invitis reprezentanton el la urba parlamento de la maldekstra partio Die Linke. Bedaŭrinde, li devis senkulpigi sin pro la ĵus eksplodinta milito en Turkio kontraŭ la kurdoj. La parlamentano estas enmigrinto el kurda regiono. Laŭ informo de la organizanto de la SAT-kongreso, s-ino Korody, granda nombro da rifuĝintoj estis akceptita en Herzberg, la E-urbo.

Mi trovis la imponan statuon al Zamenhof en la urbocentro. Ĝi estas donaco de Ĉina E-Ligo. Antaŭ la urbodomo flirtas grandega E-standardo – ĉie legeblas nomŝildoj kaj vojindikiloj en nia lingvo. Kun kelkaj k-doĵoj mi frandis koreajn kukojn kaj ginseng-teon en E-kafejo. Survoje al la kongresejo en Sieber, la hotelo Zumpass, ĉiumatene mi preterpasis altan monumenton honore al la herooj de la du mond-militoj. K-do germana komentis: En aliaj landoj eĉ ekzistas pli grandiozaj fi-monumentoj. Dum ekskursaj tagoj mi sole promenis al la urbo Herzberg. Apud la riparota ŝoseo

mi trovis vojindikilon al tombejo por la viktimoj mortigitaj apud Herzberg. En la urbo ekzistis fabriko por bomboj, kie laboris militkaptitoj kaj judoj en bagno. La tuta harca montaro estis centro de militindustrio.

Kiel anon de postmilita epoko, mi certe ŝokas tia pasinteco. Ĝi ankoraŭ vivas en mi pro la rakontoj de miaj gepatroj. Ĝi vivas ankaŭ en la koro de milionoj da germanoj. Miaj gepatroj enamiĝis en la fabriko de militaviadiloj de la marko Dornier en la balta urbo Wismar (Vismar). Ili neniel rezistis kontraŭ la krima reĝimo – mia patro eĉ mortpafis soldatojn el la brita armeo en Norda Afriko. Super lia kapo supozeble flugis aviadile nia fama s-ano William Auld: Kia infana raso!

Dum laborkunsido mi aktive kaj emocie intervenis en la debato pri la faŝismema artikolo en Sennaciulo kun la falsa titolo *Zamenhof pravis*. Iu riproĉis: SAT-anoj nur scias protesti kaj ne kapablas refuti falsajn asertojn. Se dekstrulo argumentas, ke la tero ĉirkaŭiras la sunon – tial ni devas konsenti kaj aplaŭdi lian klarigon. Ja la suno brilas kaj por dekstrulo kaj por maldekstrulo! Tial mi indignigite kulpigis la redakcian teamon pro tia senpripensa provoko. Laŭ mia opinio, ne aperu sen tuja komento faŝistaj artikoloj en Sennaciulo. Nia organo de laboristoj ne estu tribunon por ekstremistoj.

Laborkunsidojn mi aktive kaj kun intereso partoprenadis. Por la venonta SAT-kongreso en Seulo mi proponis la temon: reunuiĝo de ambaŭ Koreioj – ĉar lando ankoraŭ dividita en suda kaj norda ŝtatoj. Mia propono estis rifuzita kaj modifita al svaga formulo: Ne estu limoj inter ŝtatoj.

Dum la posta UK en Nitro, sudkorea profesoro SO Gilsu, je mia granda ĝojo, ofertas karavanon al Norda Koreio, vizito de Pjonjango kaj, plej

interesveka: Dum UK li klopodos organizi konferencon kun la temo “reunuiĝo de dividita lando sur la duoninsulo de Koreio”. Tial mi esperas partoprenon de kelkaj SAT-anoj kaj al la karavano kaj al lia konferenco. Antaŭ kelkaj monatoj mi mem jam intencis organizi karavanon, sed en tia okazo mi volonte aliĝas al la karavano kun esperantistoj el la tuta mondo. Survoje ni haltos en Ĉinio.

La kunvenejoj en Sieber estis malfacile troveblaj – iam ili okazis en la hotelo – iam en la lernejo. Programeroj abundis, kaj vere internaciaj – preskaŭ sennaciecaj. Bedaŭrinde por “ekologiaj vilaĝoj” mankis tradukisto. Min impresis “stilfiguroj” de Rob Moerbeek kaj la fundamentista prelego pri vegetara manĝo. En la vespera programo elstaris la iom vulgara teatraĵo “La kredito”, aktorita de s-anoj Filipoviĉ kaj Handzlík. Ĝi temis pri peto de kredito en banko sennacieca – sed edzina. Surloke mi organizis ĥoron por SAT-kantemuloj. Dum adiaŭa vespero mi prezentis la “irlandan baladon” – kontraŭreligian kanton. Mi mem kantis krokodillingve “la solidareco” – el iama socialisma germana respubliko GDR.

Plej agrablas la viva renkonto de s-anoj, SAT-anoj el la tuta mondo kaj la amikeca etoso. Konkludiĝis la kongreso per tondra melodio “La Internacio” (venontfoje, mi ekzamenos la parkeran kantadon). Ĝis revido dum UK- kaj SAT-kongresoj en Seulo 2017.

Ruĝ-gefrate

DIETER ROOKE,

el la komunista frakcio.

Omaĝo al Marcos Ana



Marcos Ana



Matilde Montero deklamas poemon

Mi denuncas

*Mi ne petas indulĝon. Mi ne petas
per fadeno de voĉo senkolora
pardonon por la viv' al mi ŝuldata.*

*Fi al la minca kliniĝinta voĉo,
al la koro ploranta surgenue,
al fruntoj sin ŝutintaj sur la polvon,
sur kiun la pens-lumo dispeciĝas!*

*Mi ne petas indulĝon. Ne kunmetas
la manojn tremajn en peteĝo-siĝnon.
Mia-parole brulas fier-voĉoj
postulante –sen ploro–, ke la pordoj
de la obskura venĝo tuj disfalu
kaj oni ĉiujn homojn dekruciĝu.*

*Mi ne petas indulĝon. Mi denuncas
la mortan diktatoron, kiu reĝas
la vivon de la homoj per hakilo
kaj volas meti nun kiel averton
mian tranĉitan kapon stango-pinten.*

Mi ne petas indulĝon.

Donas flaĝojn.

*Cirkulu man-al-mane la batita
kor' de mia popolo mallibera.*

La 12an de decembro 2016 okazis omaĝo al Marcos Ana fare de la asocio “Marx Madera” [1] en la kvartalo Usera de Madrido. Oni deklamis poemojn de la ĵus forpasinta poeto.

La poetino María Ángeles Maeso [2] deklamis hispane la poemon Yo denuncio (Mi denuncas) kaj, poste, la membro de Madrida Esperanto-Liceo Matilde Montero deklamis la saman poemon esperante laŭ la traduko de Miguel Fernández [3].

Sanon kaj poezion!

FÉLIX LOBO

[1] Asocio rilata al la politika partio Izquierda Unida (Unuiĝinta Maldekstro). La nomo estas hispanlingva vortoludo pri konata frazo de filmo de Buster Keaton *The General* kiam li metas al la lokomotivo pli da ligno (*más madera*).

[2] Prezento de la poezia figuro de María Ángeles Maeso kaj diversaj poemoj el ŝia poemaro Vamos, vemos (Ni iras, vidas), en traduko de Miguel Fernández, legeblas i.a. en Sennaciulo, n-ro 1-2 (1315-1316), Januaro-Februaro 2015 kaj en Sennaciulo, n-ro 3-4 (1317-1318), Marto-Aprilo 2015.

[3] Traduko aperinta en la antologio “Poezio: armilo ŝargita per futuro” eldonita de SATeH.

Los Lunes de Marx Madera

Homenaje a Marcos Ana

Poemas y Canciones para un Hombre Bueno

Mi vida
os la puedo contar en dos palabras:
Un patio y un trocito de cielo
por donde a veces pasan
una nube perdida y algún pájaro
huyendo de sus alas

Micro Abierto para recitar
Canciones a cargo del Colectivo

**LUNES 12
19:30H**

Al finalizar:
- Duelos y Quebrantos

Mi lugar para el encuentro y el debate.

Miércoles 12 de Enero 2017 19:30h
Pza. de la Asociación, 1
Ciudad Real
www.marxmadera.org
@MarxMadera

Afiŝo anoncanta la omaĝon al Marcos Ana

MARCOS ANA

Tradukis Miguel Fernández

PERANTOJ

Aŭstralio – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au

Belgio – Claude Gladly
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be

Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22

Bosnio-Hercegovino – Ivica Horvat
Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba

Brazilo – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete : esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa) : +557 7988011780

Britio – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44-1.277.22.89.62

Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk

Bulgario – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg

IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
Ĉeĥio – Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel. : +420.737230231, rete : stiburek.v@seznam.cz

IBAN : CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT : FIOBCZPPXXX

Ĉinio – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete : esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto N°6217857500009246684

SWIFT kodo/BIC : BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong
Road (M) CHANGSHA - HUNAN - ĈINIO

Danio – HENRIKSEN Kim
Hallandsgade 6; DK-2300 COPENHAGEN
rete: kimjezus@gmail.com

Francio – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio

rete : barthelemy.maurau@free.fr
Bankkonto : 1733310 N 020
IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070

BIC : PSSTFRPPPAR
Germanio – Dominik Schramm
Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO
rete : dominik.schramm@gmx.net

Hispanio – Pedro Maria Sanz Sanz

Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM

Hungario – Tóth Zsolt
Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario
Tel : +36-20-5188919 , rete : zstoth75@gmail.com
Bankkonto : 11773377-00000354
IBAN : HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000
BIC : OTPVHUHB

Italio – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRRRXXX

Izraelio – Jehošua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net

Japanio – Nakamura Daišin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete : sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon

Katalunlingvio
Viktoro Solé – KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell,
Hispanio
tel. : +34 93 716 36 33, rete: v.sole@esperanto.cat

Koreio – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com

Kroatio – Ivica Šćepanović (Truto)-poŝte
Otok Brac, HR-21414 Gornji Humac, Kroatio
Tel : +385.21.647.059, Poŝtel : +385.098.182.79.07
rete : ivica.scepanovic1@st.t-com.hr

Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka
IBAN : HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC : SOGEHR22

Litovio – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel : +37068736457, rete : grazopul@yahoo.com
Bankkonto : LT347300010001720030
BIC/SWIFT kodo : HABALT22, Swedbank

Malagasio – Justine (Lala) Lalalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llespr@libero.it

IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG

Norvegio – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio

Portugaliao – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelino, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete : morelino_sintra@hotmail.com

Rusio – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@orc.ru

Serbio
Miomirka Kovačević, Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi
Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com

IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG

Svedio – Inga Johanson
Stamppatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete : ishimg@hotmail.com au ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto : Svenska arbetesperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC : NDEASESS

Svisio – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1

Tajvano – CHO Chaoming
12F2, No. 41, Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw

Ukrainio – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net, telephone : 380 67 99 470 03

Usono – Brandon SOWERS
PO Box 52731, Atlanta, GA, 30355, Usono
nigrakajrgxa@gmail.com

Aliaj landoj
SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso) : kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj) : financoj@satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC : PSSTFRPPPAR

ebłas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal : financoj@satesperanto.org

Sennaciulo
Oficiala organo de SAT

Asocio sidejo de SAT
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
Retadreso: kontakto@satesperanto.org
Retejo: http://satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto:
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Diana Riŝar
Kasisto: Bruno Henry
Membroj: Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz,
Dominiko Simeone

Sennaciulo

Redaktoskipaj kunordigantoj: Vinko Markovo, Pedro Sanz
Enpaĝiganto: Nicolas Raymond
Ceteraj redaktantoj: Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina
Opulskienė, José Maria Salguero (Kani), Richard
Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale.

Kontribuojn sendu elektronike al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,
FR-75013 Paris, Francio

Pri financaĵoj sendu al:
financoj@satesperanto.org

Libromendojn sendu al:
libroservo@sat-amikaro.org

Libraj eldonproponojn sendu al:
pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par/Presita de:
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/jara abono:
France 39 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ
de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567

KOTIZOJ 2017

Lando	Jarkotizo	Lando	Jarkotizo
Argentino	24 €	Koreio	36 €
Aŭstralio	52 €	Kroatio	16 € (120 HRK)
Aŭstrio	52 €	Kubo	4 €
Barato	8 €	Latvio	16 €
Belgio	52 €	Litovio	16 €
Bosnio-Herc.	12 €	Luksemburgio	52 €
Brazilo	20 €	Madagaskaro	4 €
Britio	52 € (40 GBP)	Makedonio	12 €
Bulgario	12 €	Malio	4 €
Ĉeĥio	24 €	Mongolio	8 €
Ĉinio	8 € (56 CNY)	Meksiko	16 €
Danio	52 €	Nederlando	52 €
Estonio	16 €	Norvegio	52 €
Finnlando	52 €	Pollando	16 €
Francio	52 €	Portugaliao	28 €
Germanio	52 €	Rumanio	12 €
Grekio	8 €	Rusio	16 €
Haitio	4 €	Serbio	12 €
Hispanio	40 €	Slovakio	16 €
Hungario	16 €	Slovenio	16 €
Irano	12 €	Svedio	52 €
Islando	36 €	Svisio	52 € (64 CHF)
Israelo	36 €	Tajvano	32 € (1160 TWD)
Italio	48 €	Turkio	16 € (52 TRY)
Japanio	52 € (6960 JPY)	Ukrainio	8 €
Kanado	52 € (80 CAD)	Usono	52 € (64 USD)
Kolombio	12 €		

DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> **Nura abono al Sennaciulo : 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

Esperanta afiŝo kontraŭ rasismo

Esperanta afiŝo aperis kontraŭ rasismo en Akihabara, Tokio.

La 11an de decembro 2016, rasistoj manifestaciis en Akihabara, Tokio, kie estas la centra kvartalo de *otaku* (amantoj de japanaj junularaj kultureroj). Maldekstruloj manifestaciis tie kontraŭ rasistoj. Super anarkiista vico troviĝis esperanta afiŝo.

Policianoj iĝas iom post iom agresemaj de post la venko, ĉe balotado, de nova guberniestrino, kiu estas popolistino.

MIYAZAWA NAOTO



NOVAJ ALIĜOJ

36080*	SYOYAMA Mikiko.....	JP 866-0065 - YATUSHIRO-SHI_____	Japanio
36081	MAGNANI Remo.....	FR 34230 - AUMELAS_____	Francio
36082	GENBERG Johannes.....	SE 16846 - BROMMA_____	Svedio
36083	ALENCAR Esmeraldo.....	BR CEP 08744-130 - MOGI DAS CRUZES_	Brazilo
36084	DE OLIVEIRA-COELHO Luiz-Alberto.....	BR 25850-000 - PARAÍBA DO SUL-RJ____	Brazilo
36085	LANGHOLF Andreas.....	DE 74595 - LANGENBURG_____	Germanio
36086	DUBOURG-GLATIGY Pascal.....	DE 10243 - BERLIN_____	Germanio



Mandalo-pentrado kaj meditado



Folkloro vespero



**29a de Julio
5a de Aŭgusto**




<http://sat90.org/>

Gungnamji-lageto



Hwangpodotbae



Gyeongbokgung-palaco



Jeondeung-templo

